der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

25. Jahrgang Nr. 153 (1/1989) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Agadprogramo de Mondpaca Esperantista Movado

Ekde la mezo de la okdekaj jaroj la politikan fizionomion de la mondo karakterizis la argumenta debato, entreprenanta dialogo, la iniciativa volonteco, la pli grandaj malfermitecoj, la respektosento pri la konstruo de konfido kaj la serĉado de eblecoj de paca kunekzistado.
Sub tiuj signoj agadis ankaŭ Mondpaca Esperantista Movado (MEM), ties sekcioj kaj anoj uzantaj la internacian lingvon faris kaj iniciatis multon por la daŭra paco kaj solidareco.
En la jaro de la 100-jara ekzistado de Esperanto estis aranĝita la jubilea Kongreso, kiu servis la manifestadon de la Esperanto-Movado kaj la pacan klopodon de la esperantistoj. Signifa evento estis — en kies plurjara antaŭprepara laboro ankaŭ MEM ageme kunlaboris — fare de Universala Esperanto-Asocio (UEA) aranĝita seminario kune kun la Monda Packonsilio(MPK) kun la temo: „Interhoma interkompreniĝo, interpopola paco", kiu estis transpasinta en la kunlaboro de ambaŭ organizoj, servas la larĝigon de internaciaj kontaktoj kaj en pluraj gravaj demandoj certigas la kolektivan kunagon por ambaŭ movadoj.

1. Ĝeneralaj pacaj temoj.

Sur tiu kampo MEM kaj ties sekcioj kaj anoj — uzante la internacian lingvon — povas fari kaj iniciati multon por la daŭra paco, ĉar ili — sen baroj de lingvaj problemoj — povas pli facile interŝanĝi opiniojn pri la aktualaj mondproblemoj kaj per normalaj kontaktoj povas disvastigi la amikecon inter la popoloj kaj homoj kaj prezenti la veron, senmaskigi la mensogojn, redukti la bildon de „pseŭda malmiko".

1.1. La malstreĉiĝo kaj malarmado.

MEM rigardas grava tasko la luktadon por malarmado kaj por kreskado de senarmila mondo. Ĝi konsciigas la signifon de tiu kontrakto, kiu estas ligita al la likvido de mallongdistancaj kaj mezdistancaj raketoj, iniciatas la ratifikon de tiu kontrakto kaj helpas la daŭrigon de tiuj pritraktadoj.
En la konscio de tio, ke en la mondo refortiĝas la pacmovadoj, senĉese pluraj homoj ekkonas la neceson de la paco, novaj traktadoj komenciĝas pri la solvo de la neakceptebla situacio, fortiĝas la porpaca agado. MEM pli forte mobilizas la esperantistaron por kontribui al la haltigo de la vetarmado, al subteno de la proponoj pri la malarmado.

1.2. Kunagado kaj sekureco en Eŭropo.

Konsidere al tio, ke la paco en Eŭropo estas fundamenta neceso, MEM specialan atenton prezentas pri la agado, daŭre farata por informigo de kuna-

gado kaj sekureco sur tiu kontinento. MEM kontraŭstaras ĉiun klopodon, celantan misformi aŭ obstakli la efektivigon de la principoj, fiksitaj en la Fina Akto de Helsinki, eĉ alvokas ĉiujn esperantistojn kaj neesperantistojn por efektivigi la sloganon: „Kune por la pluportado de helsinkia spirito".

1.3. Solidareco al la popoloj, progresemaj movadoj.

MEM estas solidara kun la popoloj, progresemaj movadoj batalantaj por paco, libereco kaj nacia sendependeco kaj ĝi kontribuas al la pacemaj agadoj, kiuj servas la menciitajn celojn. En tiu flanko estas grave fari kontaktojn ankaŭ kun la popolaj kaj progresemaj movadoj dise en la mondo, helpante ilin en iliaj evoluadoj kaj disvastigante inter ili la lernadon de Esperanto. Pro tio MEM instigas siajn sekciojn organizi kunvendojn, kampanjojn por la solidareco kun la evoluantaj landoj kaj popoloj kaj helpi ilin ankaŭ per esperantaĵoj, materialoj.

1.4. Batalo por likvido de la militdanĝeraj aferoj.

Bedaŭrinde sur pluraj teritorioj de la terglobo okazas lokaj militoj, kiuj minacas la pacon, la sekurecon, kaj obstaklas la malstreĉiĝon. Pro tio MEM aliĝas al la strebado de la mondpaca movado, celante la ĝeneralan kaj justan aranĝon de la konfliktoj pere de traktadoj. Por solvi la konfliktojn per traktadoj MEM faras kontakton kun tiuj esperantistoj, en kies lando okazas konfliktoj kaj helpas ilian porpacan agadon. MEM en ĉiu forumo levas sian voĉon por likvido de lokaj militaj konfliktoj.

2. Specialaj taskoj de MEM.

La nuntempa, espereble evoluanta mondsituacio postulas multflankan aktivadon por paco, interkompreniĝo kaj paca kunekzistado. La taskoj ne estas simplaj, sed solveblaj, se la homoj kaj movadoj komune kunagadas, kion jam montras la unuaj antaŭenpaŝoj en la interkonsento.

2.1. Organizaj laboroj.

MEM aktivuloj

— partoprenu ĉiun forumon por helpi la konkretigon de la pacmovado kaj iniciatu ankaŭ esperantistajn aranĝojn konigante la taskojn de la pacmovado kaj MEM,
— subtenu la organizadon de pacmanifestacioj,
— organizu esperantistajn pacrenkontiĝojn, plurlandajn amikajn kunvenojn, aliĝu al neesperantistaj renkontiĝoj kaj kunvenoj kaj ankaŭ tie parolu pri la plej aktualaj pactemoj, celoj kaj rezultoj de la pacmovado,
— organizu renkontiĝojn, kunvenojn de MEM-aktivuloj kaj interesiĝantoj de MEM lige kun la Universalaj Esperanto-Kongresoj, landaj Esperanto-Kongresoj, aliaj aranĝoj, kaj pritraktu la aktualajn porpacajn kaj organizajn aferojn,
— plivastigu la nombron kaj simpatiantojn de MEM je la intereso de realigo de la movadaj celoj,
— utiligante ankaŭ siajn kontaktojn agadu pri fondoj de novaj MEM-sekcioj, perantoj kaj abonantoj de „PACO",
— per ĉiuj siaj eblecoj (interŝanĝo, korespondado, amikeco, kunlaboro, ktp.) instigu ĉiun Esperanto-grupon, klubon organizi packunvenon,
— plibonigu siajn agadojn, laŭ la Statuto de MEM.

2.2. Agitado kaj propaganda laboro:

MEM aktivuloj

— pere de siaj kontaktoj publikigu informojn pri la taskoj kaj faritaj laboroj, agadoj de MEM en Esperantaj kaj neesperantistaj gazetoj, revuoj, tiucele aranĝu dissendojn per radio kaj televido.
— urĝigu sian atenton kaj reagon por la plej aktualaj pactemoj,
— pliperfektigu siajn agitadmetodojn per disponigoj de konvenaj propagandiloj,
— subtenu la universalan, aktivan pacmovadon pere de la internacia lingvo,
— helpu la informadon al la publiko pri la aktivado de MEM per eldonado de plurlingvaj informiloj,
— regule helpu la redaktoran laboron de „PACO" kun taŭgaj artikoloj kaj informoj pri la agado de porpaca movado, ĝenerale kaj speciale pri MEM,

— pli efike utiligu la eblecojn de „La Pacaktivulo" por informado pri la eventoj okazintaj en la pacbatalo kaj pri la movadaj aferoj, organizaĵoj,
— kontribuu multigi la abonantojn kaj legantojn de „PACO", donu informon pri ĝi en ĉiu forumo kaj amikeca rondo,
— ekkaptu kaj utiligu la elstarajn jubileojn, okazintaĵojn, ŝtatajn kaj popolajn festojn, manifestaciojn por aktualaj pacaj celoj kaj speciale esperantista agado kaj MEM-agadoj,
— La redaktoroj de „PACO" kaj „La Pacaktivulo" publikigu artikolojn taŭgajn por sukcesigi la propagandon pri la aktualaj demandoj de la pacmovado kaj MEM-agado kaj certigu eblecon por efektivigi dialogon inter la legantoj konekse de la aperigitaj artikoloj.

2.3. Plifortigu la kontaktojn, kunlaborojn kun:

— Monda Packonsilio laŭ la aprobita kunlabora kontrakto inter MEM kaj MPK, helpante ties agadon kaj evoluadon,
— ĉiuj pacmovadoj efektivigante utilan dialogon kaj helpante ilian agadon,
— Universala Esperanto-Asocio, helpante la efektivigon de kontrakto inter UEA kaj MEM kaj la evoluadon de la internacia esperantista movado,
— naciaj, landaj kaj internaciaj organizaĵoj, asocioj, movadoj agantaj en la pacmovado,
— ĉiuj organizaĵoj, kies agado servas la pacon kaj la interhoman amikiĝon, ĉefe kies agado rilatas al MEM,
— junularaj organizaĵoj, ĉefe kun Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO], certigante la partoprenon de la junularo en la esperantista pacmovado kaj por certigi novajn aktivulojn por MEM el inter la junularoj,
— mondskale konataj personoj, ŝtatestroj, funkciuloj de ŝtatoj kaj sociaj organizaĵoj, sindikatoj, movadoj kiuj ankaŭ mem strebas efektivigi la daŭran pacon kaj celojn de MEM.

3. Eksteraj jubileaj aranĝoj kaj farotaĵoj dum la sekvontaj jaroj.

3.1. Monda Jardeko por Kultura Evoluigo enkadre de UNESKO. Tio estas bonuzebla por prezenti la kulturan valoron de Esperanto kaj fortigi la influon de internacia lingvo kaj paco ankaŭ en diversaj kulturaj aferoj.

3.2. „Internacia Tago de Virinoj" meritas rememoron kaj estas bonuzebla gajni la virinojn por tio, ke ili eduku niajn infanojn por paco kaj helpu la kvietan familian harmonion.

3.3. „Tago de la eksplodo de atombombo en Hiroŝima kaj Nagasaki", kiel granda katastrofo de la homaro meritas rememoron kaj estas ebleco prezenti la danĝeron de atomarmiloj, celante pli vastan kunagadon kontraŭ la atomarmiloj kaj atomarmilaro.

3.4. „Porpaca Agadtago de Sindikatoj" estas grava ago demonstracie partopreni ĝin, fortigante ties celon kaj certigi la aktivan kunlaboron kun la sindikatoj.

3.5. MEM-kunvenoj enkadre de la sekvontaj Universalaj Kongresoj estas bonuzeblaj por doni informon pri la aktualaj pacdemandoj kaj pri MEM al ĉiuj simpatiantoj, certigi forumon por interŝanĝi opiniojn pri la aktualaj porpacaj kaj organizaj demandoj.

3.6. La „Tago de la Paco" enkadre de Universalaj Kongresoj bone prezentas la pacemon de la Esperantomovado kaj esperantistoj. Ĝi estas bonuzebla por disvastigadi la esperantistan porpacan agadon, interŝanĝi opiniojn pri la aktualaj porpacaj celoj. Okaze de ĝia ripetado ĝi meritas grandan helpon por intensaj kunlaboroj.

3.7. Kvardekjara datreveno de la Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj en 1988. Tiu deklaro estas ege grava kaj meritas esti rememorigata. Kun granda energio oni helpu ties efektivigon.

3.8. Okdekjara jubileo de Universala Esperanto Asocio [UEA] en 1988. Tiu jubileo estas grava, ĉar ĝi demonstras

la bonorganizitan esperantistan movadon, eĉ ĝi estas bonuzebla por fortigi la esperantistan movadon kaj la stabilecon de Esperanto kaj de la Esperanto-movado, kaj informante pri ĝi la publikon oni povas varbi novajn simpatiantojn al la esperantista-movado.

3.9. Tridekkvina datreveno de la fondiĝo de MEM en 1988. Tiu grava jubileo estas utile uzebla por prezenti la rezulton de tiu ĉi movado, trovi novan kontakton por ĝi kun multaj personoj kaj funkciuloj de diversaj aliaj organizaĵoj. Prezenti ĝian stabilecon, necesон kaj varbi novajn anojn per tio.

4. Konklude

La konservo de la paco nuntempe estas tasko pli grava ol en la antaŭaj tempoj, pro tio ankaŭ en pli grandaj dimensioj estas necesaj:

— fortigo de la agadvolo de ĉiu unuopulo,
— plimultigo de la reciproka konfido,
— evoluigo de la homaj kontaktoj, utiligo de la ĉiam pli disvastiĝantaj eblecoj de la „popolturismo".
— efektivigo de la kontaktoj inter la etkolektivoj kaj familioj,
— elformigo de la fraturbaj kontaktoj,
— fari la pacmovadon pensanta movado.

La agadprogramo de MEM enhavas nur la plej gravajn taskojn, farotaĵojn, sed espereble donas al la movadanoj helpon por koncentri siajn agadojn al tio. Ĝi kalkulas ankaŭ kun la utilaj iniciatoj kaj memstaraj opinioj de la movadanoj de MEM.

La efektivigo de la agadprogramo poszonas komunan, seriozan konsekvencan apogon, partoprenon, kunagadon, kunlaboron de ĉiuj movadanoj.

La efektivigo de la agadprogramo postulas konkretan kunlaboron al la plifortigo kaj defendo de la paco!

La materialon konfirmis la 11-a Ĝenerala Konferenco de MEM okazinta en Budapest inter 29.04. kaj 01.05.1988.

Rim. de la redakcio:

[Ni nur iom korektis la ege malbonan lingvaĵon de la teksto, ĉar necesus reverki ĝin komplete, kio ne eblis.]

Wachsmann pri la rilato de Albert Einstein al Esperanto

En la jaro 1988 aperis la dua eldono de la libro de Michael Grüning pri la arkitekto Konrad Wachsmann (1901-1980) „Der Wachsmann-Report — Auskünfte eines Architekten" (La Wachsmann-raporto — informoj de arkitekto) en la eldonejo Verlag der Nation Berlin. Wachsmann, mondkonata kiel pioniro de la industria konstruado, aparteninta al la avangardistoj de la nova arkitekturo, konstruis la Einstein-domon en Caputh ĉe Potsdam kaj siatempe (1929) kontaktis kun Einstein. En 1979 li lastfoje vizitis GDR kaj estis akompanata kaj intervjuata de la ĵurnalisto Michael Grüning. El la sonbendprotokoloj kaj noticoj pri la interparoladoj estiĝis la Wachsmann-raporto kiel unika aŭtentika dokumentaro pri eksterordinara homo. Je la demando: „Sed kiel iam estu solvota la problemo de naciecoj? La kulturoj dezertiĝus!" Wachsmann respondis: „Tutcerte ne. Einstein pensis pri ofica lingvo por la tuta mondo, ekzemple la Zamenhofa Esperanto. Ĉiuj aliaj lingvoj pluekzistus kaj same la kulturoj." Tiu ĉi citaĵo aperas sur paĝo 132 en kunteksto de la Wachsmann-aj rememoroj pri la ideo de Einstein pri mondregistaro, kiun Wachsmann aprobis.

Fritz J. Wollenberg

REZOLUCIO

La esperantistaj pacaktivuloj el 18 landoj partoprenintaj en la XI-a Ĝenerala Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado de la 29-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1988 en Budapeŝto,
Konstatas:

1. la vanecon de la grandaj potencŝtatoj pretendi al tuteca monda hegemonio.

2. la danĝeregon pro la akumulado de enorma detruforto je pli ol 54 mil nukleaj armiloj, kies ekzisto multege superas la kapablon detrui la tutan mondon.

3. la konstantan plialtigon de la militaj elspezoj je pli ol 800 miliardoj da dolaroj ĉiujare, kiu efektive deturnas la financajn rimedojn necesajn al sociaj, ekonomiaj, ekologiaj kaj alispecaj problemoj.

4. la historian ŝanĝon konsekvence de la kontrakto de Helsinki efektiviganta la forigon de la eŭro- kaj mallongdistancaj raketoj.

5. la necesan premon de la demokrata pacema movado por progresigi la malstreĉon.

La esperantistaj pacaktivuloj de MEM pozitive taksas:

1. la reaktivigon de la monda intereso pri la traktadoj koncerne la malarmadon, antaŭ ĉio nuklean, kies perspektivoj dinamikigas la mondan pacmovadon.

2. la planon de M. Gorbaĉov je la nomo de USSR proponitan jam la 15-an de januaro 1986, la neniigon de ĉiuj nukleaj armiloj de tiam ĝis la 2000-a jaro.

La Ĝenerala Konferenco de MEM subtenas:

1. ĉiujn iniciatojn por sukcesigi la aplikadon de Helsinkiaj akordoj;

2. la redukton de la strategiaj interkontinentaj raketoj je duono laŭ la pridiskutado en Ĝenevo;

3. la malpermeson de la ĥemiaj kaj amasdetruaj armilaroj same pridiskutatan en Ĝenevo;

4. la redukton de la konvencia armilaro de Atlantiko ĝis Uralo, kiun pridiskutadas reprezentantoj de NATO kaj Varsovia Kontrakto.

La Ĝenerala Konferenco malaprobas ĉiujn provojn lanĉi produktadon de novaj diverstipaj armiloj pretekste al regionaj militoj kaj al „onidire" necesa plifortigo de defendo-sistemoj.

La Ĝenerala Konferenco, esprimante la ĝeneralan opinion de la MEM-anoj bazitan sur iliaj tutmondaj interrilatoj, **plej forte kondamnas** ĉiujn formojn de rasismo aŭ rasapartismo, kie ajn ili okazas, ekzemple nuntempe en Sud-Afriko kaj en la teritorioj okupitaj de Israelo, kie ili atingas kontraŭpopolan kriman aspekton.

Serve al la paco, la **Ĝenerala Konferenco de MEM invitas** ĉiujn esperantistojn kaj pacamantojn ĉion fari por ĉesigi la regionajn militojn, kunlabore kun ĉiuj pacmovadoj.
La Ĝenerala Konferenco de MEM alvokas ĉiujn MEM-aktivulojn konkrete plifortigi la movadon, pliampleksigi ĝin, samtempe disvolvante la uzon de Esperanto tiucele.

J. C. Wells — profesoro

Per letero de Sir James Lighthill, estro de University College London, la prezidanto de Londona Esperanto Klubo, John Wells, informiĝis la 2-an de junio ke, laŭ rekomendo de la Kolegio, li nun titoliĝas Profesoro pri Fonetiko.
John Wells doktoriĝis jam en la jaro 1971, kaj fariĝis docento (Reader) pri Fonetiko en University College London en 1982.
Al la nun konsiderinda listo de gravaj publikaĵoj, en kiuj aperas agnosko pri la faka kontribuo de John Wells aldoniĝis lastatempe la 1273-paĝa ‚Hutchinson Encyclopaedia', de kiu li estas Redaktoro pri prononcado. La tasko tiurilate inkluzivis transskribadon kaj kontroladon de 10 000 nomoj.

(El ‚Bulteno' de Londona Esperanto Klubo)

Strategia seminario en Szeged

De la 13-a ĝis 16-a de julio 1988 en Szeged (Seged), Hungario, okazis internacia konferenco sub la moto „Esperanto en la dua jarcento". Partoprenis ĉ. 20 personoj, inter ili Perla Ari Martinelli (Italio/Svislando), Rezsö Baross (Hungario), Géza Felsö (Hungario), Roland Levreaud (Francio), Jerzy Leyk (Pollando), Marco Picasso (Italio), Oszkár Princz (Hungario), Arpád Rátkai (Hungario), Sándor Révész (Hungario), Tibor Sekelj (Jugoslavio), Balázs Wacha (Hungario). La Konkludoj de Segedo estas kvazaŭ resuma protokolo, akceptita de la menciitaj personoj, post la diskuto pri du el la kvar demandoj proponitaj al la konferenco, kaj enkondukitaj respektive de Sándor Révész kaj Giorgio Silfer. Pri la ceteraj demandoj (c. Kia surmerkatiga strategio? d. Kia lerneja/faka strategio?) enkondukis Marco Picassi, respektive Geza Felsö; malsufiĉa tempo malhelpis kompili pri ili analogan dokumenton. Kaj la enkondukoj kaj la intervenoj aperos en volumo kiel aktoj de la konferenco.

La Konkludoj de Segedo celas esti referenca diskutmaterialo por plua debato sine de Esperanto.

Esperanto — inter socieo(j) kaj komunumo: kia organiza strategio por la dua jarcento?

1. Ekde 1888 ni povas paroli pri efektiva esperantistaro. Ĝi prezentas du facetojn, tuj de la komenco: socieen kaj komunuman.

Ekzemple la Nurenberga Klubo estis societa; la legantaro de **La Esperantisto** formis ian komunumon. La membrecon en la socieo atestas la pago de kotizo; la apartenon al la komunumo legitimas la lingvokono, ne la abonkotizo. La nurenbergaj klubanoj havis egalan statuson, ĉu ili scipovis la lingvon, ĉu ili lernis aŭ ĉu ili nur simpatiis al ĝi; por la legantaro de **La Esperantisto** fariĝis evidenta la diferenco inter neesperantistoj, komencantoj kaj lingvanoj; nur la lingvanoj konstituas la komunuman faceton, dum kaj lingvanoj kaj nelingvanoj konstituas la societan.

2. Inter la societa kaj komunuma facetoj ekzistas, ekde la komenco, nur parta koincido. La distingo fariĝas pli evidenta, kiam oni ekrimarkas ke la societa faceto produktas precipe propagandan servon, dum el la komunuma venas precipe kulturaj valoroj. Sociologie, la societa faceto estas precipe valore orientita realaĵo.

3. Se ni akceptas ke Esperantio estas tiel duflanka (societa/komunuma), ni plue rimarkas ke la societa flanko konsideras la lingvon kiel rimedon je la servo de la makrosocio, dum la komunuma sentas kontraston, aŭ almenaŭ konfliktan eblecon inter la mikrosocio kaj la makrosocio.

4. Konsekvence, ekzemple, unu el la ĉefaj valoroj de Esperantio, la samideana solidareco transnacia, funkcias nur se oni perceptas Esperantion en sia komunuma faceto. Ekzemple, la gastigado tra la Pasporta Servo okazas favore al la esperantisto kiu efektive scipovas la lingvon kaj en sia gastokonduto kapablas mem demonstri agrablan transnaciecon, fakte sendepende de iu membrokarto. La transnacia solidareco, en la socieo faceto, perdiĝas tuj kiam la lokaj kondiĉoj malfavoras ĝian manifestiĝon, ĉar la sorto de la socieo dependas de ĝiaj funkcikondiĉoj, neniel de la solidareco.

5. Ju pli la societa faceto evoluis kaj ekspansiis, des pli ĝi bezonis piramidan strukturon: bazo kun lokaj klub-(an)oj, provincaj kaj laŭŝtataj organizoj, internacia aŭ supernacia instanco aŭ estraro. La piramida modelo multobliĝis en la fakaj asocioj. Aliflanke, montriĝas pli kaj pli evidente ke la komunuma faceto malkonformas al tia piramida modelo.

6. La societa kaj komunuma facetoj ne nur parte koincidas, sed ankaŭ plektiĝas laŭ cirkvitoj. Cirkvito estas aro da homoj uzantaj la lingvon aŭ apogantaj ĝin, kiuj gravitas ĉirkaŭ unu aŭ pluraj polusoj: periodaĵo, opinimovado (el kio organizaĵo), kongreso, vojaĝanta instruistaro (precipe en la intermilita periodo), Esperanto-centroj (Greziljono kaj aliaj).

7. Sesa poluso estas lokalizebla en la Esperanto-familioj, kie la lingvo estas hereda fenomeno, esenca por la primara ensociigo de la infanoj (denaskismo). La ekesto kaj evoluo de ĉi tiu poluso estas kondiĉita de la matureco de la komunuma faceto.

8. Ĝis hodiaŭ la preskaŭ ekskluzive aplikita organiza modelo en Esperantio estas la „funkcia organizo", kiu havas sian akson en la hierarkio. [1] Alternative al la funkcia organizo ekdisvolviĝis la „projekta organizo", kiu havas sian akson en la taskoforto. [2]

[1] La funkcia organizo principe aliras la mondon kiel konvinkiga amasmovado aŭ almenaŭ kiel premgrupo.

[2] Taskoforto: stabo ene de kiu oni ĉerpas homojn el eventuale malsamaj fakoj por celgrupon orientitan al la plenumo de difinita projekto.

Esperanto fronte al la instituciaj strukturoj de la makrosocio: kia publikrilata strategio por la dua jarcento?

1. Ekde la jaroj 1970aj fortiĝis la kondiĉoj de konstantaj interpersonaj neformalaj kontaktoj. Lige kun tio, la plej forta integra faktoro ene de Esperantio (= la esperantlingva socisfero) fariĝis la travivaĵo de la internacia hejmeco.
Tiun ŝanĝiĝon favoris la strukturaj trajtoj de Esperantio, kiu aspektas, kompare kun la makrosocio, anticipe alternativa modelo.

2. La diversaj novtipaj socimovadaj organizaĵoj [1], bazitaj sur la slogano „pensadi globe, agi loke", akcelas la disvolvon de alternativa modelo publikrilata.
Dum la tradiciaj movadoj agas kiel premgrupo por konvinki institucion pri sia modelo, kaj pere de la institucio konvinki la homojn — la novtipaj socimovadaj organizaĵoj funkcias mem kiel modelo por aliaj homoj.
La tradiciaj movadoj perceptas la realigon de sia modelo kiel majoritatan kaj prokrastiĝan — la novtipaj socimovadoj perceptas la realigon de sia modelo kiel minoritatan kaj tujan.
En la tradicia kazo, la grandigo de la organizaĵo estas pera celo; en la novtipa kazo, la grandigo estas sinplenumo.
Tradicie, ju pli multaj ni estas, des pli forte ni povas premi — novtipe, ju pli multaj ni estas, des pli multaj vivas laŭ niaj principoj.
Tradicie, oni vidas sian rolon en la partopreno en potencbatalo kaj akiro de pozicioj tie — novtipe, oni vidas sinplenumon en la formado de la vivpraktiko.
Eksteren, la tradicia pensmaniero estas kompromisema — la novtipa ne; internen, la tradicia pensmaniero estas disciplina — la novtipa, tolerema.
Tradicie, de iu kerno disbranĉiĝas diversaj strukturoj laŭ piramida modelo — novtipe, ekestas pluraj sendependaj unuoj, diversloke iniciatitaj, disvolviĝantaj laŭ horizontala reta modelo.

3. Esperantio favoras konduton laŭ la novtipa socimovada organizmodelo. Oni konsciiĝu pri tio.

[1] NSO: sociologia difino, kiu koncernas, ekzemple, la ekologiajn movadojn, la novan pacmovadon, diversajn socikulturajn movadojn, por kiuj la ŝtata nivelo estas malpli grava.

Lingvaj ludoj dum la instruado de Esperanto

La praktikado de nova leksiko en formo de ludoj aŭ konkursoj estu esenca parto de ĉiu lingva instruado. Lingvaj ludoj povas servi por la firmigo kaj sistemigo de leksiko. Ili prezentas formon de la aplikado kaj sistemigo de lingvaj konoj.
Kiel ŝercoj kaj kantoj lingvaj ludoj krome aranĝas la instruhorojn en varia maniero kaj donas al la lernado de la lingvo novan ĉarmon. Tiamaniere ili

stimulas la aktivecon de la kursanoj. Tio estas grava speciale por la instruado de Esperanto en la Popola Vespera Lernejo aŭ dum semajnfinaj kursoj, kie la lernado de la lingvo estas libervola kaj la kursoj konsistas el personoj ekstreme diversaj laŭ klereco, aĝo kaj antaŭkonoj. Tiu ĉi materialo enhavas kelkajn lingvajn ludojn, kiuj montriĝis taŭgaj dum multjara instrulaboro en la Popola Vespera Lernejo kaj dum semajnfinaj kursoj. Ilia vico respondas al la aplikebleco, komenciĝante per la famkonata ludo „Mi vidas ion, kion vi ne vidas" por praktiki la akuzativon (aplikebla de la 3-a leciono laŭ la lernolibro de Dahlenburg/Liebig) kaj finiĝante per speciala ludo pri homonimoj (konvena por klubvesperoj).

Ellaboris: D-ro Sabine Fiedler
Riesaer Straße 53 Leipzig DDR — 7050

nomo/tasko	klarigoj	didaktika-metoda celo
1 **„Mi vidas ion, kion vi ne vidas."**	Unu kursano elektas objekton, troviĝantan en la ĉambro, kaj priskribas ĝin per ĝia koloro. La aliaj kursanoj divenas pri kiu objekto temas. (Por realigi fluan ludadon estas rekomendinde antaŭe nomi ĉiujn objektojn en la ĉambro, ripeti la kolorojn kaj skribi modelfrazon sur la tabulon: Mi vidas ion, kion vi ne vidas. Tio estas . . . Ĉu vi vidas . . . -n? Ne, mi ne vidas . . . -n. Jes, mi . . .	— **praktikado de la akuzativo** — **praktikado de la leksiko (meblaro, koloroj)** — **aŭtomatigo de la demanda frazo kaj de neaj respondoj**
2 **Rememoru la objektojn!**	Loĝejo estas meblita sur la tabulo helpe de bildoj. Poste la tabulo estas kovrita kaj la kursanoj nomu/notu la objektojn.	— **praktikado de la leksiko (meblaro)** — **trejnado de la memorkapablo**
3 **Rememoru la objektojn!**	La kursanoj imagu, ke la instruisto revenas el vendejo, kie li aĉetis diversajn nutraĵojn/vestaĵojn. Li montras la objektojn, la kursanoj nomas ilin. Poste la objektoj estas enpakitaj denove kaj la kursanoj nomu/notu ilin rememorante. (Konkursa formo eblas.)	— **praktikado de la leksiko, (nutraĵoj, vestaĵoj)** — **trejnado de la memorkapablo**
4 **Ni vojaĝas.**	Iu persono volas vojaĝi kaj enpakas diversajn objektojn en valizon. La kursanoj formas frazojn ripetante la vortojn de la antaŭuloj kaj mem aldonante novan vorton. Ekz.: 1-a: Mi volas vojaĝi al . . . kaj enpakas en la valizon ĉemizon. 2-a: Mi volas vojaĝi al . . . kaj enpakas en la valizon ĉemizon kaj pulovron. 3-a: Mi volas vojaĝi al . . . kaj enpakas en la valizon ĉemizon, pulovron kaj ŝuojn.	— **v. 3 (vestaĵoj)**

nomo/tasko	klarigoj	didaktika-metoda celo
	(Laŭ nivelo de la grupo la instruisto povas magnetofiksi bildojn de la objektoj al la tabulo.)	
5 **Ni kolektas vortojn.**	La kursanoj memstare kolektas vortojn komenciĝantajn per la sama litero. (Estas rekomendinte formi du teamojn kaj limigi la tempon.)	— **praktikado kaj pliampleksigo de la leksiko**
6 **Ni formas vortoĉenojn.**	La kursanoj nomu vortojn. La sekvonta vorto devas komenciĝi per la lasta litero de la pasinta vorto. Ekz.: loĝej**o** — **o**k — komenci	— **v. 5** — **evoluigo de la penskapablo**
7 **Formu vortojn el tiuj literoj!**	La kursanoj formu vortojn el la literoj de alia vorto. (Konkursa formo eblas. Laŭ nivelo de la kurso estas rekomendinde labori sen aŭ helpe de vortaro.) Ekz.: ESPERANTO: SPERTO TERO TRA ... (pli ol 40 eblaĵoj)	— **v. 6** — **praktikado de la vortfarado**
8 **Kolektu vortojn!**	La kursanoj kolektu vortojn pri unu temo (sporto, muziko ...) (Konkursa formo estas rekomendinda. Eblas limigi la tempon.)	— **v. 5** — **sistemigado de la leksiko**
9 **Kiu vorto kaŝiĝis?**	La instruisto skribas sur la tabulon vorton kun la literoj en malĝusta vico. La kursanoj ordigu la literojn. (Laŭ nivelo de la kurso la instruisto povas doni la germanan signifon aŭ la vortspecon.) Ekz.: DEEKRNOMI (REKOMENDI)	— **praktikado de la leksiko** — **evoluigo de la penskapablo**
10 **„Nigra-blanka"**	Dum limigita tempo la kursanoj nomu vortojn kun la sama eco (dolĉa, ruĝa, ronda ktp.)	— **v. 9**
11 **Trovu la superorditan esprimon!**	La instruisto nomas diversajn objektojn, apartenantajn al la sama semantika kampo. La kursanoj trovu la superorditan esprimon. Ekz.: jupo-pantalono-bluzo: vestaĵoj Vieno-Berlino-Moskvo: ĉefurboj ovo-fromaĝo-lakto: manĝajo	— **v. 9**
12 **Trovu la malĝustan vorton!**	La instruisto nomas diversajn objektojn, apartenantajn al la sama semantika kampo. Unu el la vortoj estas tamen malĝusta. La kursanoj trovu tiun vorton. Ekz.: sofo-seĝo-ovo: ovo patro-filo-galanto: galanto	— **v. 9**
13 **Kio mi estas laŭ profesio?**	Antaŭ la ludo ĉiuj konataj profesiaj nomoj estas ripetataj de la kursanoj. Unu el la kursanoj imagas al si profesion. Por diveni ĝin la aliaj faras demandojn, kiuj estas jesataj aŭ neataj per kompleta frazo.	— **v. 10** — **aŭtomatigo de la demanda frazo kaj de respondoj**

nomo/tasko	klarigoj	didaktika-metoda celo
	(Por raligi fluan ludadon estas rekomendinde skribi modeldemandojn sur la tabulon. Ekz.: Ĉu vi laboras en vendejo/. . .? Ĉu vi laboras sole/kun infanoj . . .? Ĉu vi vizitis universitaton?)	
14 Kiu mi estas?	Unu el la kursanoj imagas al si, ke li estas famkonata persono (ekz. Zamenhof). La aliaj kursanoj divenas la nomon helpe de diversaj demandoj. Ekz.: Kiam vi naskiĝis? Kie vi vivas?	— **pliampleksigo de la leksiko** — **korekta uzado de la demandaj pronomoj**
15 Atentu la tempon!	Unu kursano el ĉiu teamo rivecas temon kaj parolu pri ĝi unu minuton. Premion gajnas tiu, kiu ĉesas la raporton plej akurate.	— **aplikado de la leksiko** — **evoluigo de la monologa parolkapablo**
16 La fruktokorbo falas!	Antaŭ la ludo la nomoj de fruktoj (legomo) estas ripetataj. Ĉiu el la kursanoj — sidantaj en rondo — devas memorteni la nomon de frukto. Poste la instruisto nomas kelkajn fruktojn („El la fruktokorbo falas . . ."). La koncernaj personoj ŝanĝas la sidlokojn. Ĉar po unu seĝo estas ĉiam forigata, po unu persono devas eksiĝi.	— **praktikado kaj sistemigado de la leksiko (fruktoj)**
17 Pri kiu vorto temas? (laŭ televida elsendo „Spielspaß")	Oni formas du teamojn kaj du teamestrojn, kiuj rajtas elekti temon (ekz. sporto, amo). La teamestro ricevas slipon kun vorto (ekz. dek unu-metra-puŝo, mielmonato) kaj klarigu tiun per aliaj vortoj. La teamanoj divenu la vorton. Gajnas premion tiu teamo, kiu trovas sian ĝustan vorton pli rapide.	— **v. 9**
18 Kiel nomiĝas (laŭ germana ludo „Teekesselraten")	Antaŭ la ludo la lingva fenomeno „homonimo" estu klarigata teorie kaj per ekzemploj. Poste du bone preparitaj personoj priskribas po unu sencon de la vorto. La aliaj personoj en la rondo divenas la homonimon. Ekz.: 1-a: Mia vorto difinas pafilon. 2-a: Mia vorto difinas muzikaĵon. 1-a: La objekto konsistas el cilindra metala tubo. 2-a: Oni kantas ĝin ĝenerale grupe. 1-a: El la objekto kugloj estas elĵetataj per eksplodo de pulvo. 2-a: Mi volas klarigi mian vorton per sinonimo: ĉenkanto. (KANONO) (Aliaj homonimoj: kamero, karaktero, gruo, marko, akto, disciplino, etiketo . . .)	— **v. 9**

9-a Interlingvistika Seminario

„Ĝenerala lingvistiko kaj esperantologio"

Post jubilea paŭzo dum la jaro 1987, jen la sekva interlingvistika seminario en GDR, denove en Ahrenshoop, de la 30-a de oktobro ĝis 3-a de novembro 1988. La kadra temo de la 9-a: „Ĝenerala lingvistiko kaj esperantologio — rilatoj — rezultoj — problemoj".

Partoprenis entute 33 fakuloj, kiuj reprezentis 6 universitatojn (Leipzig, Berlin, Halle, Rostock, Greifswald, Jena), 2 teknikajn universitatojn (Magdeburg, Dresden), 2 pedagogiajn altlernejojn (Magdeburg, Dresden) 2 teknikajn altlernejojn (Merseburg, Zittau), 2 akademiojn (Akademio de Sciencoj de GDR, Akademio de Pedagogiaj Sciencoj de GDR), la inĝenieran altlernejon Zwickau kaj Kulturligon de GDR. Kiel eksterlanda gasto partoprenis d-ro Erich Spitz de la altlernejo pri mineksploatado Ostrava (ĈSSR).

Inter la partprenantoj estis 3 universitataj profesoroj, 2 docentoj kaj 14 doktoroj. 17 partoprenintoj posedis certan scion pri Esperanto. Ankaŭ ĉeestis 4 nunaj kaj 3 estontaj universitataj lektoroj de Esperanto.

Oni prezentis jenajn prelegojn:

— Bazaj problemoj de interlingvistiko kaj rezultoj de la interlingvistikaj seminarioj en Ahrenshoop (doc. d-ro sc. Detlev Blanke, Kulturligo/ Humboldt-Universitato Berlin)

— Demografiaj prognozoj kaj la problemo de monda lingvo (PhDr. Erich Spitz, Csc, Ostrava)

— Eurolatinum (Prof. d-ro sc. Johannes Irmscher, Akademio de Sciencoj)

— Socilingvistikaj aspektoj de la tradukado (Prof. d-ro sc. Manfred Uesseler, Teknika Universitato Magdeburg)

— Maŝina tradukado — interlingvistika tasko (d-ro sc. Hannelore Völkel, Humboldt-Universitato Berlin)

— Lingvo-evoluo — lingvoplanado en Norvegio (d-ro Klaus Krüger, Universitato Greifswald)

— Pri la koncepto de manlibro pri socilingvistiko (Prof. d-ro sc. Manfred Uesseler, Teknika Universitato Magdeburg)

— Pazigrafioj kaj videbla poezio (d-ro Hartmut Sörgel, Humboldt-Universitato Berlin)

— 100 jaroj Esperanto — lingvistikaj kaj esperantologiaj aspektoj (doc. d-ro sc. Detlev Blanke, Kulturligo/ Humboldt-Universitato Berlin)

— Pri la nocio „termino" (d-ro Klaus Krüger, Universitato Greifswald)

— Terminologiaj principoj kaj ilia normigado (Wera Blanke, Berlin, Terminologia Esperanto-Centro de UEA)

— Lingva interfero kiel fonto de eraroj kaj deflankiĝoj: Angla-Esperanto (Gerda Häusler, Teknika Universitato Magdeburg)

— Tempeco, pasiveco kaj aspekteco en Esperanto — pri la ata-ita-problemo (d-ro Ronald Lötzsch, Akademio de Sciencoj de GDR, Centra Lingvistika Instituto)

— Pluevoluigado koncepta de la fremdlingvoakiro en lernejoj (prof. d-ro habil. Klaus Günther, Akademio de Pedagogiaj Sciencoj de GDR)

— Interlingvistiko kaj Esperanto en universitatoj kaj altlernejoj — internacie kaj en GDR (doc. d-ro sc. Detlev Blanke, Kulturligo/Humboldt-Universitato Berlin)

— Pri lernolibro de Esperanto por studentoj kaj sciencistoj (doc. d-ro sc. Hans-Jürgen Mattusch, Universitato Halle)

Vespere oni povis aŭskulti en Esperanto prelegon pri Rotterdam kaj la 73-a UK. Krome oni prezentis sonbendojn kaj videobendojn, kiuj tre efike demonstris la fonologiajn ecojn de Esperanto kaj vekis interesajn fakdiskutojn.

D. B.

40-a IFEF-Kongreso en Perpignan

Ŝajnas, ke la jubileoj por la fervojistoj-esperantistoj ne finiĝas: post la 75-jariĝo de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) en 1984, la 100-jariĝo de Esperanto en 1987, de la 4a — 11a de junio 1988 okazis en la pitoreska, sudfranca urbo Perpignan la 40-a kongreso de IFEF. Do, Francio estas por fervojistoj ĉefe la lando de „TGV-Train à Grande Vitesse" (Trajnoj kun grandega repideco). Tio estis vere bona aŭguro, ĉar la ekzistantaj TGV-linioj de Francaj Ŝtataj Fervojoj SNCF gvidas al la direkto Sud-Oriento, kie ankaŭ situas la ĉi-jara kongresurbo.

IFEF estas f a k a organizaĵo, do, la kongreso devas respeguli tiun ĉi karakteron. Kio okazis?

1. La ĉefprelego sub la temo „TGV Atlantiko — pri fervoja reto de grandrapidaj trajnoj al Okcidento kaj Sudokcidento de Francio" per kiu la francaj gastigantoj informis pri la nova projekto „TGV Atlantique", per kio SNCF plivastigas la rapidegajn fervojorilatojn el la ĉefurbo al la atlantika marbordo, maksimume rapideco 300 km/h (Paris — sudoriento 270 km/h).

2. Enkadre de „Novaĵoj pri diversaj fervojoj" diverslandaj fervojistoj informis. Parte per lumbildoj la fervojistoj el Norvegio/NSB, Danlando/NSB, Jugoslavio/SJ, Aŭstrio/ÖBB kaj Pollando/PKP prelegis pri novaj lokomotivoj, litvagonoj kaj uzo de (mikro-)elektroniko kaj instalaĵoj por fervojaj celoj.

3. Ekskurso al la nova, moderna varstacidomo Perpignan-Roussillon, de kie trafikas rapidaj vartrajnoj, veturantaj je 120, 140 kaj 160 km/h al francaj kaj eksterlandaj nutraĵ-vendejoj. La estro de la stacidomo donis multajn interesajn informojn.

4. Kunsidis la terminara kaj fakprelega komisionoj, kiuj internaciskale jam de multaj jaroj agadas kaj laboradas: la plej grava rezulto estas la traduko de la pli ol 10 000 vorta, kvinlingva fervoja fakterminaro de UIC (Internacia Fervoj-Unio) en Esperanton.

5. Kunsidis la redaktoroj de fervojistaj gazetoj kaj bultenoj, por spertinterŝanĝi pri la farado de plejeble interesaj asociaj eldonaĵoj. La „Fervojistaj Novaĵoj" de la GDR-a fakgrupo estis disdonita dum la kongreso kaj estis laŭdita de multaj gekongresanoj dum personaj interparoladoj pro la enhavo. Memkompreneble okazis multaj disputoj pri la nuntempaj ĉefaj fervojoj kaj trafikproblemoj post la unuopaj prelegoj aŭ aliokaze, ekz. pri grandrapidectrafiko, ekonomiaj problemoj kaj zorgoj pri la estonteco de fervojo (ĉefe flanke de gekolegoj el kapitalismaj landoj), elektrizado ktp.

Okazis ankaŭ balotoj por la IFEF-estraro. Menciindas, ke la ĝisnuna tre ŝatata IFEF-vicprezidanto Per Engen el Norvegio ne denove kandidatis, novelektiĝis Istvan Gulyas el Hungario. En sia adiaŭa alparolo substrekis Per Engen la fakan karakteron de IFEF kaj la gravecon de faka laboro de la membraro.

Finfine la plej grava rezulto por la fakgrupo de esperantistoj-fervojistoj ĉe GDREA estas la plena membreco al IFEF ekde junio 1988, kiun la IFEF-Komitato unuanime decidis. Tio ebligos ankoraŭ pli intiman kunlaboron kun IFEF kaj ties landaj asocioj, kiel substrekis la subskribinto dum sia dankalparolo.

Kiel estas kutimo dum la IFEF-kongresoj, la gastiganta franca IFEF-sekcio ankaŭ okazigis kulturan kaj turisman programon, por ke la gastoj bone konatiĝu kun tiu ĉi ĉarma, suda kataluna regiono apud la Mediteraneo kaj de Pireneoj proksime de la hispana limo. Neforgesebla ankaŭ restas fervoja ekskurso laŭlonge de la mediterenea marbordo al Marseille kaj Cannes kaj la hejmenvojaĝo pere de TGV Montpellier-Paris.

La 41-a IFEF-kongreso okazos de la 13a — 19a de majo 1989 en Salou/Hispanio.

A. Meinel

„Saksa Kuriero"?

Ĉu vi ankoraŭ ne abonis „Saksan Kurieron"? Ne eblas. Vi maltrafas la legadon de tre originala revueto. GDR-anoj petu provekzemplerojn de GDREA. Eksterlandanoj el socialismaj landoj abonu la revuon pere de siaj korespondamikoj. Interesitoj el kapitalismaj landoj direktiĝu al GDREA. Jen la abonkondiĉoj por GDR-anoj:

1. La gazeto „Saksa Kuriero" aperas sesfoje jare, ĉiu numero ampleksas po 8 paĝojn.
2. Abonado eblas je du limdatoj kaj en du diversaj kategorioj:
   Kategorio 1: Jarabono (6 numeroj) por la tuta jaro 1990
   Mendo: ĝis la 1-a de decembro 1989
   (poste ne eblas!)
   Kategorio 2: Duonjara abono (por la dua parto de 1989, entute 3 numerojn, do de la n-ro 4 ĝis n-ro 6 de la 1989-a jaro)
   Mendo: ĝis la 1-a de junio 1989
3. Unuopa numero kostas 1 markon, jarabono kostas 5 markojn, duonjara abono kostas 2,50 markojn. Per jarabono vi povas ŝpari monon, ĉar vi pagas por kvin — sed ni liveras al vi ses numerojn!
4. Nur post eniro de la transpagita sumo kaj de la abonilo komenciĝos la liverado pere de via distrikta peranto.
5. Pripensu, ke vi povas aboni ankaŭ por viaj en- kaj eksterlandaj geamikoj! Ni sendas al vi tiom da ekzempleroj, kiom vi deziras. Ju pli da ekzemplerojn ni disvendas, des pli profitodona estos la eldonado de nia gazeto!
6. Eksterlandanoj povas aboni nian gazeton „Saksa Kuriero" ĉe siaj korespondantoj aŭ ĝin direktu al GDREA, Otto-Nuschke-Straße 1, Berlin, DDR — 1080
7. **GDREA-anoj nur mendu ĉe la sekvaj adresoj de la koncernaj distriktaj perantoj de „Saksa Kuriero":**

Berlin:
Linde Knöschke, Malmöer Str. 26, Berlin, 1071

Cottbus:
Ulf Beling, Kirchhainer Str. 13, Finsterwalde, 7980

Dresden:
Esperanto-Verband, Bezirksvorstand, Goethe-Allee 37, Dresden, 8053

Erfurt:
Matthias Reimann, Platz der Freiheit 20, Ellrich, 5503

Frankfurt/O.:
Uwe Siebert, Jägerstr. 12, Wriezen, 1313

Gera:
Christine Wagner, Lutherstr. 54, Jena, 6900

Halle:
D-ro Erich Kalbe, Kurt-Hertzau-Straße 1, Bitterfeld, 4400

Karl-Marx-Stadt:
Lisbeth Scheinert, Waldenburger Straße 58, Karl-Marx-Stadt, 9090

Leipzig:
Literatura Sekcio de GDREA, P. O. pk. 713, Leipzig, 7010

Magdeburg:
Klaus-Dieter Dungert, Olvenstedter Grund 25, Magdeburg, 3042

Neubrandenburg:
Werner Lewien, Ernst-Alban-Straße 26, Neubrandenburg, 2000

Potsdam:
Karl Müller, Am Zernsee, 5, Golm, 1501

Rostock:
Wolfgang Vogt, Heinrich-Heine-Ring 61, Stralsund, 2300

Schwerin:
Hans Diedrich, Wittenburger Straße 106, Schwerin, 2753

Suhl:
Gerda Herold, Herrenbergstraße 19, Meiningen, 6100

La 2-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto (IAKSTE)

(10. — 16. aŭgusto, 1988, Pekino)

En la 2-a IAKSTE partoprenis pli ol 1400 sciencistoj-esperantistoj, inter kiuj estis pli ol 100 el 22 landoj. La konferenco ricevis pli ol 300 sciencajn studojn. Tio montris senprecedencan prosperiĝon de Esperanto en la kombinado kun scienco kaj tekniko. La Pekina Televida Stacio diskonigis la malfermon de la konferenco tuj en la vespera programo. Inter la 9-a — 11-a de aŭgusto pri la konferenco informis ankaŭ la jurnaloj „Popolo" (inkl. eldono en eksterlandoj), „Lumo", „Ĉina Junularo", „Ĉinio" (China) en la angla lingvo, „Ĉina Kulturo", la Novaj-agentejo Xinhua k. a. Multaj kongresanoj laŭdis ĝian okazigon kaj esprimis sian deziron aliĝi al la venonta konferenco.

1. Grave atentata de la gvidantoj kaj subteno de diversaj flankoj

La gvidantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj (ĈAS) donis multajn atentojn por la konferenco. La inaŭguron prezidis s-ro Yan Dongsheng [1]) kaj paroladojn faris s-roj Lu Jiaxi [2]), Li Zhensheng [3]). Krome ankaŭ Chen Haoshu, vicministro de la ministerio pri disaŭdigo kaj televido kaj s-ino Zhu Lilan ĉeestis la inaŭguron kaj donis kelkajn vortojn. Ili opinias, ke Esperanto kiel „internacia komuna parollingvo" tre konformas al la bezono de la reala vivo. Apliki Esperanton en la sciencteknika kampo estas komuna deziro de ni ĉiuj. Ili alvokis ankaŭ, ke sciencistoj kaj teknikistoj lernu, diskonigu kaj apliku Esperanton.

Kelkaj respondeculoj de ministerioj aŭ komisionoj de la lando estis invititaj por prelegi en la konferenco.

Ekzemple, la vicprezidanto de la Ŝtata Scienca Komisiono Zhu Lilan prelegis pri „ekspluato de alta tekniko en Ĉinio"; s-ino Zhang Yuzhen de la Novteknika Buroo de la sama komisiono prelegis pri „novaj teknikoj kaj faktoroj puŝantaj ilian evoluadon"; s-ro Wu Heng, prezidanto de la Ŝtata Komisiono pri Sudpolusa Esplorado prelegis pri „sudpolusa esplorado"; s-ro Gao Wenxue, vicprezidanto de la Ŝtata Sisma Buroo prelegis pri „altigu la kapablon kontraŭ tertremo"; prof. Yang Jiaxi de la Ĉina Spacteknika Instituto prelegis pri „la spaca scienco"; s-ro Shi Xinhan, vicestro de la Sciencteknika Buroo de la Trafika Ministerio prelegis pri „disvolvo de la trafika kaj transporta aferoj de Ĉinio"; kaj s-ro Wang Rukuan, vicestro de la Farmakologia Informa Instituto de la Higiena Ministerio prelegis pri „evoluo de novaj kuracteknikoj en Ĉinio". Tiuj prelegoj traktis pri gravaj problemoj kun tre freŝa opinio, kiuj estas nun zorge atentataj en- kaj eksterlande. Pro tio ili estis tre laŭdataj de la kongresanoj.

2. Diversfaka interŝanĝo kun alta nivelo

La prelegoj estis legataj ne nur en la ĝeneralaj kunvenoj, sed ankaŭ en ses grupoj dividitaj laŭ fundamenta scienco (inkl. matematiko, fiziko, kemio, astronomio, geologio kaj biologio), teknika scienco, medicino, ekonomio kaj komerco, lingvo kaj eduko. Inter ili troviĝas altnivelaj prelegoj, kiaj „natura produktaĵo — hipokrelino" de Jiang Lijin, esploristino de la Fotografikemia Instituto sub ĈAS. Hipokrelino povas esti uzata en kuracado de kanceroj. La esploro pri hipokrelino kaj ĝiaj derivaĵoj havas gravan signifon por fototerapia medikamento el luma biokemio. „LB-membrano — efika molekula arkitekturo" de prof. Jiang Long de la sama instituto vekis grandan intereson de japana erudiciulo prof. Takeo Sugano. Ili varme interparolis kaj ĝoje trovis sin samfakuloj de koloida kemio. Geofizikistoj Gu Gongxu, Weng Wenho kaj Lu Niudun unuafoje prezentis sian prelegon en Esperanto. La supre menciitaj prelegoj enhavis plej novan esplorrezulton, novan eltrovon kaj novan opinion kaj faris apartan kontribuon ĉu en sciencoj ĉu en praktiko. La matematikisto Christer Kiselman el Svedio, ĝenerala sekretario de Internacia Scienca Akademio Comenius, emfazis en sia prelego la gravan signifon de matematiko por formi la tuthomaran civilizacion kaj homan naturon. La kemiisto Sinitirô Kawamura el Japanio, membro de la gvidantaro de Internacia Scienca Asocio Esperantista, prelegis pri „proteino kiel nutraĵo". Prof. Lee Chong-Yeong el la fakultato de Komerco kaj Ekonomio Kyungpook, Nacia Universitato de Taegu, Sud-Koreio, prelegis pri „teknologia evoluo kaj ekonomia kooperacio". La ekonomikisto M. Gábor el Hungario prelegis pri „la rolo de teknika evoluo en la hungara ekonomia reformpolitiko". Biologo pri akvaj vivuloj, Nomra Tadacuna, el Japanio prelegis pri „praktika kulturado de maraj planktonoj en Kumamoto-prefektujo". Iliaj prelegoj ricevis aplaŭdojn pro vidpunkta freŝeco.

3. Vigla konsultado pri ekonomia komerco

Por ke Esperanto estu aplikata ankaŭ en ekonomio kaj komerco, ni aranĝis tiufakan grupon. En ĝi partoprenis ĉ. 500 personoj el ĉ. 100 kompanioj kaj entreprenoj. En kvar duontagoj ili prezentis 5 studojn kaj kvarfoje konsultis unu alian. Inter ili troviĝis respondeculoj de la ekonomio-komercaj instancoj de diversaj provincoj kaj municipoj de Ĉinio, kiuj kun grupo aliĝis al la konferenco kaj diskonigis al la aŭskultantoj la ekonomian staton de sia loko. La grupo de ekonomio kaj komerco prezentis registron de 27 laŭbezonaj informoj, 218 ordinaraj informoj pri ekonomio kaj tekniko kaj 7 internaciaj interkonsentoj subskribitaj. Tio donis bonan bazon por apliki kaj disvastigi Esperanton en tiu kampo.

4. Rezolucioj kaj premioj

Post varma diskutado la konferenco akceptis skribitan proponon kaj 8 rezoluciojn, nome (1) fondi Ĉinan Sciencteknikan Esperanto-Federacion; (2) fondi Internacian Sciencteknikan Interligan Reton de Esperanto; (3) prepari fondiĝon de Internacia Esperanta Scienc-teknika Informcentro; (4) prepari fon-

diĝon de Internacia Esperanta Ŝcienc-teknika Universitato; (5) kolekti monon por favori eldonadon de sciencteknikaj libroj; (6) kompili kaj eldoni disertaciaron de la 2-a IAKSTE; (7) la venonta konferenco okazos inter 25—30 de majo, 1990 en Pekino; (8) en decembro de 1989 okazos konsulta kunveno de teknika transdonado kaj ekonomia kunlaboro en Esperanto en la ĉina urbo Shenzhen.

En la lasta tago de la konferenco ĈAS disdonis premion „Verda Kosmo" al 13 famaj sciencistoj en — kaj eksterlandaj pro ilia elstara kontribuo en sciencoj kaj en internacia Esperanto-movado, kaj premion „Verda Stelo" al 13 unuoj kaj personoj, kiuj faris apartan kontribuon en la prezentado de programoj kaj videoj, kaj ekspozicioj dum la konferenco.

5. Taksoj pri la konferenco

Bonaj taksoj pri la konferenco sin trovis ĝenerale inter la kongresanoj. Malgraŭ ke ni havas iujn neperfektajn preparlaborojn dum la organizado de la konferenco, oni donis ankoraŭ altan takson opiniante, ke la konferenco montris forton de la ĉina Esperanto-movado en vigla kaj senĉesa kreado, modele kuraĝigis la kongresanojn por sin direktadi en la estonta movado.

Prof. Shen Chenru, vicprezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub ĈAS/STEA

[1]) Yan Dongsheng: Konstanta Komitatano de Cina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco (ĈPPIK), Prezidanto de la Kemia Departemento de ĈAS kaj Prezidanto de STEA sub ĈAS

[2]) Lu Jiaxi: Vicprezidanto de ĈPPIK, Prezidanto de la Prezidantaro de ĈAS kaj Honora Prezidanto de la STEA sub ĈAS

[3]) Li Zhensheng: Vicprezidanto de ĈAS

FOKUSO N-RO 88/2 (6) — internacia popularscienca periodaĵo

Laŭ la ricevitaj leteroj, la legantaro de FOKUSO ĝenerale akceptas kaj laŭdas la novan formon kaj temaron de tiu ĉi periodaĵo, kvankam kelkaj legantoj bedaŭris, ke la rubriko pri komputado malkreskis. Sed nun, en la kajero 88/2, tri interesaj kaj longaj artikoloj koncernas la komputadon.

G. Vitályos (H) montras bildojn el la mondo de fraktaloj. Tiu branĉo el la matematiko de la funkcioj kaj geometrio de Mandelbrot estas vasta kampo por eksperimentoj per grafikeblaj komputiloj, kaj ĝi gvidas al la demando: ĉu estas limregiono inter matematiko kaj arto? En la sekvencoj de la geometria fraktalfunkcio ĉiam denove aperas karakteriza figuro: la ursido. Cetere, oni ne bezonas IBM-kongruan mikrokomputilon por fari tiujn figurojn, sed sufiĉas iu ajn grafikebla hejmkomputilo (interesiĝantoj turnu sin al la aŭtoro de tiu ĉi recenzo).

Superrigardon pri la produktado de mikrokomputiloj en la eŭropaj socialismaj landoj prezentas d-ro Broczko (H). Bedaŭrinde enestas kelkaj eraroj. De kie d-ro Broczko konas la Robotron-komputilon A7100/W, eĉ IBM-kongrua, kiu tamen ne ekzistas? Malgraŭ tio, la artikolo montras la altan nivelon de socialisma-landa produktado de mikrokomputiloj kaj la klopodojn fariĝi sendependaj de la kapitalisma merkato.

Laŭ la artikolo de M. Fettes, eminentan antaŭenpason al aŭtomata lingvotradukado montras la Distribuita Lingvo-Tradukado (DLT), en kiu Esperanto funkcias kiel interna pontlingvo. La sistemo jam naskiĝis en 1982 laŭ ideo de T. Wittkam, sed ekde 1988 ekzistas testita prototipa sistemo. Ĉu la enorma ŝanco por Esperanto, elkreskinta el tiu sistemo, realiĝos? Mankas ja lingvistike kompetentaj kaj kunlaborpretaj esperantistoj. La sorto de DLT dependas de la trijara periodo 1989—1991, en kiu la sistemo kompletiĝos kaj universaliĝos. Kunlaborantoj serĉataj.

En la rubriko pri edukado, prof Aranson (Usono) raportas pri utilaj efikoj de la planita kunlaboro en klasĉambro. Antaŭkondiĉo estas la forigo de iu ajn etnaj kaj rasaj baroj. Li priskribas la „puzlo-metodon", laŭ kiu oni disigas la lernantojn en ses-membrajn grupetojn. Ĉiu lernanto ricevas sian taskoparton, kaj la kunmetendaj eroj rezultigas la unuon. La rezultoj el eksperimentoj de tiu ĉi metodo montras la ĝustan vojon por kreskigi memrespekton kaj lernplenumon, redukti intergrupan malamon kaj levi la allogecon de la lernejo.

„Verda ondo" nomiĝas internacia laborgrupo por naturprotektado fondita en 1988 en Sovetunio. La laborlingvoj estas la rusa, la angla kaj Esperanto. La tasko de esperantistoj estas propagandi la programon tutmonde, uzante Esperanton, por unuigi la strebojn de simplaj terloĝantoj kun la celo preventi la ekologian katastrofon. Pri tiu grava projekto raportas L. Medvedev (SU) en la artikolo „Ekologio kaj Esperanto".

I. Sterbetz (H) okupiĝas pri la biologia horloĝo funkcianta en ĉiu vivestaĵo. Konekse al tio, la ornitologoj esploras la fenomenon de la migrado de birdoj. Gravas la birdoprotektado per internaciaj kontraktoj por eviti la ekstermadon de migrantaj birdospecioj.

M. J. Tanoira (Argentinio) skribas pri ŝtatigita kaj burokratigita ekonomio, kiu gvidis tiun landon el riĉeco kaj prospero al la stato de evoluanta lando.

Certe preskaŭ ĉiu leganto trovosion interesan en tiu kajero!

Elmar Starke

Forpasis Erich Würker

En „de" 4/88 ni gratulis al nia Erich Würker okaze de lia 85-a naskiĝtago. Kaj jam nun ni havas la doloran devon informi pri lia forpaso, la 11-an de februaro 1989. Erich Würker neniam dum sia vivo estis malsana, kaj jen pulmoinflamo falĉis lin. Ni perdas en li ne nur tre viglan kaj originalpensan membron de nia Centra Estraro, sed ankaŭ bonkoran homon, kiu vivis sian vivon tre konscie, ĉiam forte ligita al la Esperanto-movado kaj ties idealoj. Ni gardas al Erich Würker dignan memoron.

CE de GDREA

AEST 1988 en Poprad

Laŭ invito de la Scienc-Teknika Sekcio (STS) de la Slovakia Esperanto-Asocio (SEA), kaj post kelkjara paŭzo en tiu serio, okazis la konferenco AEST (Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), sub la ĉeftemo „Raciigo en Scienco kaj Tekniko", de la 3-a ĝis la 5-a de aŭgusto 1988 en Poprad sub Altaj Tatroj (ČSSR). Antaŭe estis aliĝintaj 51 kolegoj el 7 landoj, sed fakte kunvenis 38 el 5 landoj. SEA disponigis du domojn el la kvar nun renovigataj domoj ĉe la placo Sobotské námesti en la malnova urboparto de Poprad, kaj la kunvenintoj loĝis, manĝis kaj konferencis tre komforte. La aranĝo enhavis prelegojn grupigitajn laŭ la diversaj aspektoj de la ĉeftemo „raciigo". La plej elstara apartaĵo de la konferenco estis la nekutime ampleksa kaj vigla diskutado post preskaŭ ĉiu prelego. Tio impresige montris la vivkapablon de la fakaj lingvoj en Esperanto.

La prelegoj aperos en aparta volumo, sed la nepartoprenintoj nur malfacile akiros ĝin. Pro tio mi listigas la aŭtorojn kaj titolojn (laŭ la prelegsekvo):

- Konciza pritakso de fakaj aranĝoj (V. Němec, CS)
- Perspektivoj de socia evoluo kaj signifo de internacia komunikado (J. Britka, CS)
- Raciigo de homaj celoj kaj kondutoj (J. Sárközi, H)
- Raciigo de sciencteknikaj laboroj en meteorologio kaj hidrologio (P. Dobeš, CS)
- Progresivaj trafiksistemoj (M. Feifičová, CS)
- Raciigo de la produktado de la plastaj fenestroj en Žilina (R. Vyskočil, CS)
- Naturprotektado en Subtatra regiono (M. Zvara, CS)
- Pri la rilato inter kibernetiko kaj prognozistiko (J. Britka, CS)
- La uzado de mikrokomputiloj kiel instrusistemoj en ČSSR (J. Vojaček, CS)
- La raciigo de la produktado de konduktilkartoj helpe de mikrokomputiloj (I. Slávik, CS)
- Simpla modeligo de fizikaj procesoj per komputilo (J. Sárközi, H)
- Morfologia ebeno de Esperanto el vidpunkto de lingvaj universalajoj (S. Košecký, CS)
- Danĝero de pragmata sperto en terminologio (J. Werner, CS)
- Kelkaj rimarkoj pri kalkeoj en Esperanto (A. Bednařík, CS)
- Al la raciigo de terminologia kaj vortara laboroj (K.-H. Simon, GDR)
- Kvalito-kriterioj de aplikaj programsistemoj (J. Gondžúr, CS)
- Kontrolado de programoj verkitaj en COBOL per uzado de la gramatiko LL(1) (I. Ratkó, A. Horváth, H)
- Programsistemo por datum-prilaboro PRODAT (V. Němec, CS)

Laŭ miaj personaj impresoj mi nun notas kelkajn gravajn ideojn el la prelegoj.
Inĝ. J. Britka donis en la du prelegoj ege interesajn pensvojojn pri la perspektivoj kaj prognozoj por la sciencaj aplikoj. Tio des pli gravas, ĉar li profesie laboras en instituto de prognozistiko. Mi citas kelkajn frazojn el la diskutado pri tiuj du prelegoj: „La internacia neesperantista kunlaboro lamas. La esperantistoj donu modelon de kunlaboremo" (J. Sárközi). „Ni organizu la scienc-teknikan laboron konkrete, modeste, sed fidinde" (J. Werner). „Alvokoj ne utilas, nur ekonomia premo helpos. Ni kreu ĝin. Ni eluzu la fakton, ke internaciskale la informoj nun estiĝas varoj" (A. Bednařík).

La prelegoj pri aplikoj de komputiloj estis senescepte konkretaj kaj en bona kvalito. La uzado de la terminoj sekvis la komencitan vojon de TEC; neniu preleginto aŭ diskutinto uzis la tro precizajn termino-proponojn de la PIV-Suplemento aŭ de R. Eichholz. La prelego de inĝ. J. Gondžur pri kvalitokriterioj de programsistemoj esprimis la plej esencajn spertojn de la modernaj programistoj kaj estas komparebla kun la rezultoj de la gvidantaj institutoj de la mondo. Inĝ. I. Slávik montris ilustre la konkretan laboron en la sfero de la elektroniko.

D-ro S. Košecký venis al la interesa konkludo, ke Esperanto enhavas ĉiujn trovitajn teoriajn universalaĵojn de la etnaj lingvoj, kvankam la ellaborintoj de la universalaĵoj ne uzis Esperanton kiel fonton. En la disputado oni ne finrespondis la demandon, ĉu la universalaĵoj povus esti mezursistemo por la taŭgecgrado de iu ajn lingvo kiel internacia komunikilo.

Inĝ. J. Werner avertis pri la danĝero senkonscie transpreni naciajn enhavojn en internacian terminaron („pragmata sperto"). Mi citas kelkajn kromajn frazojn: „Terminojn oni devas preskribi per internacia instituto. Ne eblas lasi la terminologion al la tempo, al la evoluo. Ni ne hontu, ke Esperanto estas alia ol la etnaj lingvoj. La granda manko de la PIV-Suplemento estas, ke decidis nur unuopaj pri ties enhavo, sed ne internacia kolektivo(j). Kaj tiuj unuopuloj tro sekvis sian pragmatan sperton, eĉ verkis erarojn, kiel ekzemple „duoni" anstataŭ „duonigi" por la matematika termino."

Estontaj AEST-konferencoj devas okazi. Tion substrekis ĉiuj partoprenintoj de AEST 1988 en rezolucio, adresita al SLEAJ. En tiu dokumento ili petas pli ol antaŭe subteni la sciencteknikan agadon kaj tiajn konferencojn, kaj morale, kaj finance, kaj organize. Ili proponas, ke dum sekvaj SLEAJ-konsultiĝoj ankaŭ kunvenu la gvidantoj de la sciencteknikaj sekcioj kaj ke ili regule interkonsentu pri okazontaj konferencoj, kies loko variu de lando al lando. Finfine „nur konferencoj montras la vivkapablon de normigitaj terminaroj" (V. Němec). La fakuloj provu vojaĝi al konferenco **dejore**. La entreprenaj ĉefoj permesos tion, se la temoj estos sufiĉe aktualaj kaj altkvalitaj. (Tiel estis en Poprad, kaj kelkaj venis dejore!). Nepre partoprenu en ĉiu tia konferenco la gvidantoj el la socialismalandaj STS kaj el TEC. (Tio ne estis plenumita en Poprad.)

La plej grava ekkono estas la sperto, ke la sciencteknika agado en Esperanto funkcios nur ĉi-kaze, se ekzistas gvidantaro, kiu per **profesiaj gvidmetodoj** planas, disdividas, kontrolas, premas kaj organizas tian laboron. (Modelon por tio montris inĝ. V. Němec, kiu instigis prelegi kvin gekolegojn el Žilina.)

Ni speciale danku al la kolegoj inĝenieroj Britka, Gondžúr, Němec, Slávik kaj Zvara, kiuj bonege preparis kaj gvidis la konferencon kaj donis fortan impulson por la daŭrigo de tia serioza laboro.

Michael Behr

FOKUSO — la unua kompleta jarkolekto

Internacia, esperantlingva, popular-scienca periodaĵo pri scienco, tekniko, socio, eduko, ekonomio, naturo, medio. Eldonata de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest.

Aperas 4 numeroj ĉiujare je 75 — 100 paĝoj, abonebla en GDR ĉe: Michael Behr, Koburger Str. 83, Markkleeberg, 7113, por 24 M (sendu al konto 8499-54-36851 kun la menciita adreso). FOKUSO estas periodaĵo popularscienca sed altnivela, kiu aperas anstataŭ la ĝisnunaj periodaĵoj „Internacia Komputado" kaj „Sciencaj Komunikaĵoj". La temaro, komence forte orientita al mikroelektroniko kaj komputado, nun vastiĝis al la terenoj laŭ la subtitolo. Tio eble malĝojigas la komputistojn, sed entute estas avantaĝo, ne nur por la ekzisto de la jurnalo, sed ankaŭ por la legantaro, kiu ne nur konsistas el komputistoj. Ankaŭ la komputisto interesiĝas pri sciencaj flankregionoj.

La temaro de unu jaro montras la vastan regionon, kiun pritraktas la periodaĵo. La tekstoj estas facile legeblaj kaj komprenebl aj ankaŭ por nefakuloj kun meza klereco. Ilustraĵoj klarigas la tekstojn, multaj karikaturoj spicas ilin. La anoncoj de diversaj entreprenoj aperas en formo de informivaj teknikaj artikoloj kaj estas legeblaj kiel faktekstoj.

Numero 1/87 (76 paĝoj) jam estis recenzita en „de" 5/87. Tiu ĉi numero ankoraŭ enhavas grandan parton pri mikroelektroniko kaj mikrokomputado. Krome aperis artikoloj pri sciencaj parkoj (kiel centroj de scienco), nevideblaj enspezoj de la loĝantaro (precipe de hungaroj), kaj pri novaj psikiatriaj kuracmetodoj. Numero 2/87 (104 paĝoj) havas rubrikon de la Ornitologia Rondo Esperantlingva „La Mevo", kaj ĝi per tio montras parton de biologia temaro de FOKUSO. Robotoj estas ĉeftemo de la dua numero. Diversaj artikoloj montras la evoluon de robotoj en la historio kaj klarigas ilian teknikan funkciadon. Difino de la nocio „roboto" laŭ Japanaj Industriaj Normoj kaj Internacia Organizo por Normigo (ISO), Klarigo de strukturo kaj specialaj nocioj, la klasifikado de manipuliloj, preniloj kaj sensiloj estas pritraktataj en diversaj artikoloj. Ankaŭ oni trovas en la kajero iom pri artefarita inteligento, observon pri robotizo kaj homo (ĉu aperas robot-revolucio?) kaj pri enpenetro de robotoj en agrikulturon („agrimatado"). Mikrokomputilojn produktitajn 1986 en orienta Eŭropo montras tabelo (laŭ mia opinio erara kaj malekzakta). Por eviti tiujn erarojn estus necese havi naciajn fakajn kunredaktorojn.

Novajn eblecojn en batalo kontraŭ malignaj tumoroj pritraktas artikolo pri kancer-esploro (MTA-metodo CELLADAM). Hungara klubo de kanceruloj prezentiĝas kaj montras 7 atentigajn signojn por memkontrolo pri kancero. Ne nur korpa sano, sed ankaŭ psika sano necesas por kontenta funkciado de korpo kaj vivo. Intervjuo kun hungara profesoro György temas pri tio. Ekonomia rubriko analizas la internacian financ- kaj ŝuldokrizon. Numero 3/87 (72 paĝoj) okupiĝas pri programadaj lingvoj, precipe pri PROLOG, nova programlingvo de la artefarita inteliekto. Nun ankaŭ la rubriko „edukado" aperas per ekzemplo de talentflegado kaj specialigo por fari ŝakgeniulojn. Eksperimentojn en la hungara lernejsistemo montras sinjoro P. Gabor. Sur 3 paĝoj aperas raporto pri lernejaj kooperativoj. La ekonomia rubriko montras la neceson de la novenkondukado (angle: innovation) kaj en la parto pri naturprotektado (La Mevo) oni ne nur ekscias pri akustikaj komunikadoj de birdoj (birdoj ne parolas Esperante) sed ankaŭ pri la neceso konservi lupojn kaj protekti papiliojn. Globofulmoj aperas malofte sed eventuale tre detruante. La misterajn fenomenojn montras la fizika rubriko.

Numero 4/87 (80 paĝoj) unuafoje ne enhavas iun ajn temon pri mikroelektroniko aŭ komputado. Ĝi estas praktike eldono de „Sciencaj Komunikaĵoj", sed ankaŭ tre interesa por nebiologoj. Por veki la apetiton kaj konservi la sanon jam delonge la homo uzas spicojn. Legu pri tio en tiu ĉi jurnalo. Enkonduko en la biologion estas temo kiu montras, kiel interesa povas esti tiu fako (kvankam ofte malŝatata en la lernejo). Ĉu ĉimpanzo havas familian senton? Tion vi ekscios en artikolo pri komunikado kaj konduto de bestoj.

Konklude, FOKUSO ĉiam estas aktuala kaj interesa, kion ankaŭ montras la temaro por 1988. Mi denove abonis jarkolekton de FOKUSO (esperante, ke la rubriko mikroelektroniko denove plivastiĝos).

Elmar Starke

RENKONTIĜO DE E-INVALIDOJ

La I-a Internacia renkontiĝo de E-invalidoj okazos inter la 19a kaj la 27a de aŭgusto 1989 en urbo Česká Třebová, ČEĤOSLOVAKIO. La ĝenerala temo de la renkontiĝo estas — KION SIGNIFAS ESPERANTO POR INVALIDOJ —.

La renkontiĝon aranĝas Sekcio de E-invalidoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, informpetojn adresu al:

Sekcio de E-invalidoj
PK 63, Slaný 274 OL,
ČEĤOSLOVAKIO

Terminologia Seminario 1989

okazos de 12-a ĝis 21-a de junio en Poprad por terminologiaj aktivuloj. Kostoj: 1000 ĉeĥaj kronoj. Petu informojn ĉe Wera Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113-05, Berlin, DDR — 1141.

Recenzoj

Erika Kopietz: Jenino Markso (Jenny Marx) el ŝia vivo. (Reviziis: Hermano Bermano, Henriko Nišvico kaj Rikardo Šulco.) Esperanto-Centro Paderborn 1987.

Libro pri la vivo de Jenny Marx, la edzino de Karl Marx, estas salutinda entrepreno. Verŝajne ne ekzistas esperantisto, kiu ne konas almenaŭ la ĉefajn vivdatojn de la fondinto de la scienca komunismo; la virino je lia flanko, tamen, ofte restas en la fono. La aŭtorino E. Kopietz sukcesas klarbilde montri la senĉesan partoprenon de Jenny en la sorto kaj batalo de Karl Marx kaj ankaŭ la oferojn kaj suferadon, kiujn ĝi postulas. La vivo de Jenny Marx estas nedisigebla de tiu de Karl Marx kaj same meritas atenton. Ni nur imagu la grandan scienculon kun edzino, ĉiam grumblanta: „Serĉu finfine lukran laboron anstataŭ skribi librojn, kiujn neniu volas presi. Ni ne havas monon, . . ., sed la infanoj bezonas ŝuojn kaj . . .!" La verko de Karl Marx elstara por la tuta homaro estas neimagebla sub tiuj kondiĉoj. Ĉu la sukcesoj de la „grandaj viroj" en la historio ne ĉiam estas — almenaŭ parte — ankaŭ la meritoj de iliaj edzinoj?!

Pro tio estas ĝojige, ke aŭtoroj jam en multaj lingvoj sin dediĉas al priskribado de la vivo ĝuste de Jenny Marx. Ĝojige estas ankaŭ, ke nun ekzistas tia laborajo en Esperanto. Malĝojige tamen estas, ke — ĝuste en la internacia lingvo — necesas parenteza subtitolo por klarigi pri kiu temas. Ĉu Esperanto vere bezonas tion?!

Per tio mi jam intencas indiki, ke mi sentas dubojn pri la lingva formo. Pro la titolo kaj la nomo „Rikardo Šulco" kiel unu el la lingvaj reviziantoj sur pĝ. 2 oni jam dekomence fariĝas suspektema. Bedaŭrinde la sombraj antaŭsentoj montriĝas veraj.

Mia ĉefa kritiko rilatas al la esperantigo de la propraj nomoj:

(1) Laŭ mia opinio oni uzu personajn nomojn laŭ al originalo, do, mi preferas Ludwig von Westphalen (anstataŭ Ludoviko Devestfalujo — pĝ. 4), Justus Liebig (anstataŭ Justo Libigo — pĝ. 10) kaj Ernest Jones (anstataŭ Ernesto Ĝounzo — pĝ. 22). Escepton formas nomoj, kiujn oni devas transskribi, ĉar ili ne uzas latinajn literojn (ekz. la rusa); sed ankaŭ ĉi tie oni strebu al redono de la originalo, t.e. skribu Černiševski (anstataŭ Černiševsko — p. 24).

La aplikado de la sufikso -in por marki virinajn antaŭnomojn (Jenny — Jenino, Eleanor — Eleanorino) estas superflua; ĝi kripligas la originalon kaj malfaciligas la identigadon. Konfuzo ekestas precipe en kazoj, kie la sufikso -in jam estas elemento de la nomo (Ekz. Betina Dearnimo — pĝ. 9 — ĉu Betta von Arnim aŭ Bettina von Arnim?).

(2) Same oni ne ŝanĝu ĉiujn geografiajn nomojn (nomojn de urboj, placoj, stratoj ktp.). La ĝenerale edukita esperantisto konas la adreson de la familio Marx en Londono: 28 Deanstreet kaj ekspektas trovi ĝin en la teksto en tiu formo (Deanstreet aŭ Deanstrato). Tiel, cetere, oni kutime agas ankaŭ en la internacia Marx-Engels-Esplorado. Esperantigitaj formoj (ekz. Dinstrato — pĝ. 21, Zalcvedelo — pĝ. 4, Hajdparko — pĝ. 21, Lenkaŝiro — pĝ. 24) pro tio strange tuŝas.

(3) Mi tute malkonsentas tradukojn de propraj nomoj en fakta literaturo (ekz. Verda Parko — pĝ. 21 anstataŭ Green Park, Nova Strateto — pĝ. 4 anstataŭ Neugasse, Romianostrato — pĝ. 4 anstataŭ Römerstraße). Propra nomo estas nature kreskinta elemento de la lingvo, je kio la origina motivo de la nomado eĉ ofte estas malfacile trovebla. La parolanto uzas ĝin kvazaŭ etikedon, kutime senkonsciante pri la signifo de la komponentoj.

(4) La listo de la propraj nomoj je la fino ne kapablas redoni al la verko la specifan etoson, kiu estis forigita per la kripligo de la propraj nomoj. Tian suplementon oni povus uzi por klarigi la prononcadon de maloftaj naciaj nomoj aŭ por doni informojn pri historiaj personoj aŭ okazintaĵoj, kiuj estas menciitaj. Sed tiu ŝanco bedaŭrinde restas neutiligita. Tiel ekz. verŝajne ne ĉiu esperantisto scias pri enhavo kaj graveco de la evento Hambacher Fest (Solenaĵo de Hambaĥo — pĝ. 7).

Pli marĝenaj kritikoj rilatas al nekutima vortfarado. Kial ekz. formi **partumi** (pĝ. 12 kaj aliloke) anstataŭ uzi la internacie konatan verbon **partopreni?** Kelkaj esprimoj ŝajnas tro forte influataj de la germana lingvo (ekz. bone burĝa — pĝ. 5, hejmen preni kiel edzino — pĝ. 4). Krome — laŭ mia scio — oni devus uzi la refleksivan posedan pronomon sur pĝ. 11 linio 27, pĝ. 13 linio 24, pĝ. 17 linio 19.

Resume oni devas kompati la aŭtorinon E. Kopietz, kies verko suferas domaĝon pro la lingva reviziado, precipe pro la esperantigo de la propraj nomoj. Kiel historiismoj kaj arkaismoj kondukas la leganton de historia verko en pasintajn situaciojn, tiel same nacilingvaj nomoj povas doni al verko specifan nacian koloron. Pri tio neniu aŭtoro aŭ tradukisto rezignu.

D-rino Sabine Fiedler

Turisma Renkontiĝo

La internacia turisma renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro XII-a ITREE 89 okazos de 17. 9. — 23. 9. 1989 en Boži Dár, proksime de Oberwiesenthal. La loka Esperanto-grupo Karlovy Vary kore invitas vin. La feria domo de ĉeĥa entrepreno „SPOLUPRACI s DRUŽEBNI SKUPINA SVAZU", (renkontejo) havas 58 dormlokojn.
Tial skribu al la prezidanto de la loka Esperanto-grupo en Karlovy Vary kaj postulu invitilojn, programon kaj aliĝilojn:
Miloš Bloudek, Vyšehradská 4, ČS 360 01 Karlovy Vary.

Amuza legado pri Til ‚Strigospegul', elgermanigita de Rikardo Ŝulco, Esperanto-Centro Paderborn, 1987. 376 p., 14 x 21 cm, ilustrita.

La ĉefrolulo ekster Esperantujo jam estis vaste konata, ĉar la anekdotaro pri li estis tradukita jam en multajn lingvojn. Kun granda probableco li vere vivis, sed ne ĉiuj anekdotoj de la libro aŭtentike temas pri liaj faroj. Strigospegulo estas multtalenta fripono, kies ofte maldelikataj, eĉ maldecaj ŝercoj eble ne estas laŭ ĉies gusto. Liaj kritiko kaj moko prefere trafas klerikojn kaj riĉulojn. La libro pri Til' Strigospegul' komence de la 16-a jarcento estas reprezentanto de nova, ekestiĝanta popola literaturo.

La tradukinto, Rikardo Ŝulco, ne estas nekonato en Esperantujo. Per certaj tradukprincipoj, klarigitaj en la enkonduka parto „Ekmigro de Strigospegulo al Esperantujo", li sukcesas savi la naivan forton kaj naturan drastecon de la basgermana originalo (la strasburgaj eldonoj de 1510/11, 1515 kaj 1519), el kiu li rekte tradukis en Esperanton. Sed Ŝulco ne simple tradukis, li pliriĉigis la verkon per du propraj sonetoj, unu anekdoto memverkita (la 42-a, kiu mankas en la originalo), meditemaj, klarigaj notoj al ĉiuj 96 historioj, epilogo „Strigospegulo, la unika kaj liaj Strigospeguloj" kaj bibliografio. La libro estas dediĉita al Ludoviko Espinalto Mimoo, la tradukinto sekvas la principojn de ties t.n. Analiza Skolo, Ne konsiderante la intence uzitajn stilelementojn por krei esperantlingvan version adekvatan al la basgermana originalo, kelkaj apartaĵoj de la lingvaĵo ne trovas mian aprobon. Unue Rikardo Ŝulco nenecese oftege uzas la kunmetitan respektive kompleksan verboformon de la perfekta prezenco aŭ antaŭprezenco (-as . . . -inta), verŝajne, ĉar tiu ĉi formo en la germana estas la vaste uzata komunuza formo por tutsimple nur indiki la preteriton, neglektante, ke en Esperanto la komunuza formo estas la simpla preterita formo (-is). Tio tedas kaj malfaciligas la komprenon (ekzemple „. . . estas akceptintaj, . . . estas konintaj, . . . estas volintaj, . . . estas volinta" sur p. 61, por doni nur unu ekzemplon). Aliflanke li ne uzas kompleksajn formojn, kvankam ili necesas, se temas pri kondicionalo. Senescepte li uzas la simplan „-us" anstataŭ „-us . . . -inta" (ekz. „starus" anstataŭ „estus starinta" kaj „mortigus" anstataŭ „estus mortiginta" sur p. 79). Ofte mankas la akuzativa finaĵo montranta la direkton post prepozicioj, kiuj povas indiki kaj lokon kaj direkton (en, antaŭ, malantaŭ, inter, sur, trans).

Karakteriza por Rikardo Ŝulco estas la rigora esperantigo de propraj nomoj. Esperantigo rilate al geografiaj nomoj por li signifas ne nur la adapton al la ortografio de Esperanto kaj provizon per la necesa vortkategoria finaĵo. Parte li eĉ tradukas la nomojn, kio kreskigas i.a. jenajn „belajn florojn":

Espervadejo (Erfurt), Aŝersvivo (Aschersleben), Manjovalo (Marienthal), Duonurbo! ! (Halberstadt), por nomi nur kelkajn. Kompreneble ili ne estas troveblaj en iu ajn atlaso, kio necesigas plurpaĝan klarigan liston de la propraj nomoj fine de la libro. Pro la por Ŝulco deviga provizo de virinaj personaj nomoj per la sufikso „-in" el „Anna" fariĝas „Anino", ktp. La libro estas provizita per la originalaj ilustraĵoj, kiuj enestis jam en la germana eldono el la 16-a jarcento, la grafika aspekto estas tre bona, preseraroj preskaŭ tute forestas (mi trovis nur du). Entute Strigospegul' do ricevis indan veston por tramigri Esperantujon.

Al la germanaj Esperantistoj mi rekomendas la paralelan, komparan legadon de la germanlingva eldono, aperinta en Reclams Universal Bibliothek (volumo 370). Mi devas konfesi, ke mi ofte pli bone konprenis la tradukon de Ŝulco ol la basgermanan originalon.

Do, se ne tro ĝenas vin la konataj kaj supre nomitaj apartaĵoj de la lingvaĵo, ĝuu la legadon!

Dieter Dungert

Sonĝo de Ĝenĝen
Ĉina eldonejo Pekino, 182 x 161 cm
Teksto kaj bildoj de Mej Jing

La 45paĝa libreto donas nivelon, dezirindan ankaŭ por niaj infanlibroj. Mallongaj, trafaj tekstoj en bona Esperanto konvenas kun ravaj, tute klaraj desegnajoj. Eĉ sen vortoj la enhavo de la instruriĉa historieto estus komprenebla:

Ĝenĝen, tute dorlotita knabino, nenion volonte faras. Ŝi ne vestigas sin mem kaj eĉ ne volas manĝi. Per sia bona manĝaĵo Ĝenĝen nutras la dombestojn. La avertojn de la patrino ŝi ne atentas. Finfine ŝi malgrandiĝas tiel forte, ke la vento forblovas ŝin kaj ŝi devas vivi nun inter insektoj. Tie ŝi ekscias, ke ĉiuj kapablas ion fari. Ankaŭ ŝi volas danci kiel la kokcinelo, porti sitelojn kiel la abeloj, sed ŝi ne havas forton. Eĉ la heliko kaj testudo pli rapide kuras, ol ŝi. La rano senkaŝe kritikas ŝin kaj ĉiuj bestetoj malestime konstatas:

Ĝenĝen estas tro dorlotita, ŝi nenion kapablas fari. Ŝvitege ŝi ekvekiĝas. Ho, tre bone, ĉio nur estis sonĝo!

Elĉerpinte lecionon el ĝi, Ĝenĝen nun bonkondute manĝas kaj vestigas sin mem.

Edeltraud Zettier

Nemere, Istvan: Serĉu mian sonĝon. Romano. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1987. 171 pĝ.

La nomo de Nemere certe estas konata. La aŭtoro publikigis jam plurajn verkojn en Esperanto, kiuj kutime elstaras per temelekto kaj profesia, flua stilo. Li ne estas amatora verdlingva verkanto, sed profesia artkreisto, kies hungarlingvaj verkoj estas konataj pertraduke ankaŭ eksterlande.

La romanoj de Istvan Nemere ofte estas fikciecaj, li preferas iom nekonkretan ĉirkaŭaĵon por siaj herooj ĉiu en estonteco („La fermita urbo") ĉu en nuntempo („La monto"), kvankam iam jes eblas rekoni, kiun konkretaĵon la aŭtoro celas („La blinda birdo": Suda Respubliko aludas Sudafrikan Respublikon, Skandio iun skandinavian landon). Ĝuste pro tiu ioma nekonkreteco leganto povas rekoni similaĵon ĉu ĉe najbaraj homoj ĉu en la propra lando. Ne eblas diri „Nu jes, tio priskribas fremdan landon." La fikciaj lokoj de Nemere troviĝas ĉie.

Ĉi tiu nova romano temas pri nevera agado, sed ne estas fikciaĵo. Lokoj kaj personoj estas difinitaj: Venecio en Italio, la hungaraj turistoj-geamantoj Gabor kaj Lilla, la armeno Diran. La kerno de la romano estas koncizege resumebla: Diren pafmortiĝas post la vana provo mortigi la turkan prezidenton, lia kunulo grave vundiĝas. Mi deklaras tion ĉi tie, ĉar la atenco nur estas fono, ĝi ne ludas portantan rolon en la romano.

„Serĉu mian sonĝon" laŭ mi estas troe varblibro pri Venecio. La komprenebla entuziasmo pri la belaĵoj de ĉi tiu perlo kelkfoje proksimigas la aŭtoron al la rando de kiĉo.

Priskriboj pri Venecio do okupas eksterordinare grandan lokon en la libro. Dua baza ebeno estas diskutoj inter la hungaroj kaj la armeno. Diran estas ano de subpremita-subpremata minoritato en Turkio. Lia vivo, lia vojo al la (terorisma?) subgrundo estas prezentata. Gabor kaj Lilla, kiuj ne scias pri lia partopreno en la planata atenco, el iom diversaj vidpunktoj devas preni pozicion. Tamen — en tiuj interparoloj mi sentis mankon de „ruĝa fadeno". Opinio kontraŭ opinio. La leganto mem devas formi propran pozicion, sed mi dubas, ke la romano helpas kompreni fremdajn starpunktojn aŭ klarigi eĉ nur unu flankon de la multfaceta fenomeno „terorismo".

Tial mi nek volas nek povas resume juĝi la libron. Nemere sin pruvis denove LA romanaŭtoro de Esperanto, kaj li tre lerte prenis apartan, malfacilan temon.

Michael Lennartz

Nemere, Istvan: Terra. Sciencfikcia romano. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1987. 151 pĝ.

Averto kaj espero: tiuj du estas la portantaj sentoj de la nova Nemere-romano.

(Parenteze: Uzante la esprimon „Nemere-romano", mi kompreneble supozas, ke ĉiu konas la nomon de la hungara aŭtoro Istvan Nemere kaj mian ĝenerale entuziasman opinion pri li.)

En „Terra" oni trovas interesan kosmoveturadon, sed mankas strečaj aventuroj kun strangaj ekstermondaj monstroj. Ĝi estas plie filozofia ekskurso tra la estonteco de la homaro:

Post dekmil jaroj la homoj delonge forlasis la malpurigitan, vivminacan hejman planedon kaj disvastiĝis sur artefaritaj insuloj en la kosmo. Nur Yarkos, la fabelisto, retrovis ĝin kaj per granda, tutuniversa televida elsendo rakontas pri ĝi.

Terra, la patrinplanedo, reformiĝis, la naturo finfine venkis kaj denove donas lokon por kelkmilionoj da homoj. Terra nun estas izolita, zorge flegata paradizo. Tiel la romano de Nemere estas averto pri zorga traktado de niaj ĉirkaŭaj rimedoj kaj same esprimas la esperon, ke la homoj jes kapablas reteni kaj konservi sian vivmedion: „Mi fidas, ke Terra kaj ĉiu homa loĝloko plu vivos" (p. 142).

Tamen la paradizo ne estas sen mankoj kaj kontraŭdiroj, eĉ la memelektita izoleco estas kritikata: „Ne estas sekreto, ke tiu ĉi parto de la Pensantoj jam delonge opinias: ni devus ĉesigi la izoladon de Terra . . . Ni, kiuj kredas, ke nur teknike ni postrestis malantaŭ la Ekstera Mondo verdire scias: ni postrestis sur multaj aliaj kampoj" (p. 136). Jen denove Nemere instigas pri pensado kaj provokas komparon al hodiaŭo. Certe kun nevidebla ironia rideto li atentigas pri la relativeco de niaj konceptoj:

„Hodiaŭ mi jam menciis, ke onidire iam la homoj parolis en diversaj lingvoj. Mi aldonas, ke tiu teorio estas tiomege absurda kaj mallogika, ke mi persone ne kredas ĝin." (p. 100) Kaj aliloke: „Mirigis min, ke de tempo al tempo ŝi uzas vortojn por mi tute nekompreneblajn: lando, nacio. Mi nur konjektis, ke tiuj estis iaj imagitaj aŭ realaj grupoj de interesoj aŭ kontraŭinteresoj, kaj ties teritoriaj konvenaĵoj . . ." (p. 113).

Flanke Nemere pentras la bildon de konservativaj regantoj, kiaj hodiaŭ certe ne ekzistas: „. . . la komitato decidis ne esplori la aferon de Terra. Ĉar la komitato timas, ke ĝi trovos la planedon. Kaj tiam la tuta fabelo . . . realiĝos." (p. 147).

Michael Lennartz

Sigrúd Eldjàrn: Praavo kaj la kotokukoj, Trad. Ragnar Baldursson (en Esperanton), Ohyama Sari (en la japanan). Tokio. Libroteko 1988, 28 p.

„Kvankam Islandanoj estas nur 250 miloj laŭnombre, eldoniĝas en Islando ĉiujare ĉirkaŭ 350 libroj, el kiuj 90 — 100 estas libroj por infanoj. La teksto kaj la bildoj de tiu ĉi libro estas faritaj de la sama aŭtoro, kiu estas filino de Kristján Eldjárn, antaŭa prezidanto de Islando", ni legas sur la lasta paĝo de la originaleca kaj plaĉa dulingva infanlibro pri la kvarjara Anna, ŝia preskaŭ blinda praavo kaj la hundo Jakobo. Unu el la ĉefaj aventuretoj, kiujn Anna travivas kun sia avo, estas la „Kotokukumado", t. e. la bakado de kotokuko, pri kio la praavo elstaras. Entute tre simpatia porinfana legaĵo.

D. B.

Vladimir Ĉerkez: Espanja Espanja. Poemo, eld. Asocio de jugoslaviaj volontuloj de la hispana respublikana armeo kaj Esperanto-asocioj de Beogrado kaj Sarajevo. Trad. Vesna Skaljer-Race, Beogrado, 1986, 37 paĝoj

Ruĝa kajero kun nigra-blanka grafikajo kovrilpaĝe montranta Dolores Ibárruri antaŭ amasego da batalpretaj volontuloj kaj la slogano „Por la libertad" akceptas la leganton (kiu ŝatas poemojn aŭ interesiĝas pri historio) kaj kondukas lin tuj kaj decide kelkajn ĉapitrojn en la historio returnen al la tempo de internacia solidareco kun la porlibereca batalo de la hispana popolo kontraŭ faŝismo. 50 jaroj intertempe pasis — signalas al ni la unua paĝo, antaŭ ol Pablo Picasso per „Guernica" retiras nin al la terura realeco de Hispanio en 1937. Sekvas antaŭparolo de prof. d-ro Boĵo Popovič pri la aŭtoro, pri la poemo kaj ĝia deveno, kaj post citaĵoj de la Pasionaria kaj Ernest Hemigway, post dua, grava antaŭparolo de la redaktoro pri la historia fundo kaj post fotografaĵo de angla monumento memore al la Internaciaj Brigadoj finfine sur la 15-a (de 37) paĝo komenciĝas la poemo, kiun ĉiu nun, post tiom da informoj, povos legi koncentriĝante plene al ĝia estetika valoro, ĝia funkcio aŭ efiko.
Poemo aŭ epopeo, ĝi havas naŭ ĉapitrojn de diversa longo, strofojn kun tri ĝis dek tri versoj, blankversojn sen certa, regule revenanta ritmo, do ĉu eble pli prozo ol poezio? La aŭtoro de la poemo bone konas la ĉitempajn eventojn kiujn li priskribas, bone konas la sindonemon de la batalintaro kiun li prikantas, bone konas la simbolecon de la tiama solidareco kiun li bildigas centoble, per ĉiam novaj bildoj kaj ĉiam (ankaŭ en la traduko) trafe heroecaj vortoj.
Unu rimarko fine: Kial la redaktinto ne findecidis pri la ortografio de la propraj nomoj en la kajero? Ni trovas tie Esperantan (Ibaruri, Pikaso) kaj tie ĉi nacilingvan (Ian Walters, Hemingway).

Ulrich Becker

Bronza Tigro (historia dramo kvinakta) de Ĝuo Moĵuo, esperantigita de Seimin
Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1985, 15 x 21, XII, 122 p.
Bela libro, bele presita.

Dum la periodo de la 7 militantaj regnoj (408 — 221 a. K.) Ĉu, Han, Ĉin, Ŭej, Ĉji, Ĝaŭ kaj Jan la plej longa milito regis ekde 262 inter Ĉin kaj Ĝaŭ. Ĉin venkis, mortigis la militestrojn kaj enterigis 400 000 venkitojn vivaj. Tiu kruelaĵo rezistigis la popolon kaj la armeon kontraŭ Ĉin. Ĝaŭ ne fordonis sian ĉefurbon al la sieĝantoj, sed la fortoj pli kaj pli elĉerpiĝis. Oni petis helpon de Ŭej kaj Ĉu.
La teatraĵo ludas en 257 a. K. en Daljang, la ĉefurbo de Ŭej. Estas du partioj: La reĝo Anli timigita de Ĉin kaj la princo Ŝinling, kiu el morala vidpunkto kaj por fini la agresecon de Ĉin opinias devi doni helpon. La aŭtoro, kiu skribis la teatraĵon por veki la patriotismon de sia popolo dum la revolucia tempo komence de nia jarcento, pentris bildon pri antagonismaj — nome malbona kaj nobla — karakteroj. Inter la homoj ĉirkaŭ la ĉeffiguroj la patrino de Ŝinling elstaras per modela vivkonduto kaj pensmaniero transdonindaj al sekvaj generacioj.
Ĝuo Moĵuo sekvis la regulojn de la klasikuloj kaj donis ĉiujn rimedojn surscenigi grandan dramon.
Kiel eŭropano prijuĝi tradukon el la ĉina lingvo en la Esperantan preskaŭ ĉiam estas iom aroganteca. Unue oni nepre devas laŭdi, ke Seimin distingiĝas per senkomplikeco kaj klareco en la lingvo. Li tre penas eviti la ripetadon de esti. Tial oni trovas amase verbigitajn adjektivojn kaj ankaŭ iĝ kiel refleksivo servas al tio, laŭ internacia tendenco. Kelkfoje tute mankas iu verbo anstataŭ esti. Ankaŭ povus anstataŭ estus povinta aŭ povintus (ekz. p. 16) ne estas korekta.
Ekster Ĉinio nuntempe ne ofte estos okazo studi kaj prezenti la dramon.

Monika Ludewig

La eldonejo „Progreso" [Moskvo] en 1990 planas eldoni:

1. **K. Marks, F. Engels. Manifesto de komunista partio. (ilustrita kaj kun notoj). Traduko de D. Blanke.**
2. **Ju. Ŝĉerbak. Ĉernobil. (Dokumenta rakonto).**
3. **Rusia revolucio de 1917: Kiel tio okazis? (Bildlibro).**
4. **J. Reed. Dek tagoj, kiuj skuis la mondon.**
5. **Paco (Almanako 1990, eldono de la sovetia MEM-sekcio).**

Petar Mišković, La Ĉevalsalto. Aerinvado al Drvar en 1944, epopeo kaj historiaj faktoj. Sarajevo, „elbih", 1986. Trad. Senad Čolić. 90 paĝoj, broŝ.

Ne temas proprasence pri epopeo, kiel promesas la subtitolo. En la libro dominas tre detalaj historiaj faktoj. Ili rakontas ĉefe pri la perforta kaj senskrupula strebado de la germanaj faŝistoj en 1944 likvidi la estraron de la popolliberiga movado kaj ĝian gvidanton, marŝalon Tito.
Por pli bone kompreni la historian fonon de la aeratako al Drvar (kaŝloko de la Tito-a stabo dum certa tempo), antaŭ la ĉefa teksto legendas la tra interesa studo pri la „Kontribuo de Jugoslavio en la dua mondmilito". Centre de la tuta libro prave staras la taktike prudenta agado de la popolliberigaj fortoj kaj de ĝia stabo, kaj la suferado kaj precipe la heroeca batalo de ĉiuj tavoloj kaj popoloj de Jugoslavio, kiun aŭtoro kaj tradukinto imprese komunikis al la leganto, detaleme, kun la koro ĉe la 1 705 000 dummilite pereintaj jugoslaviaj homoj. Do, ĉu eble tamen epopeo?

Ulrich Becker

Ĉinaj familiaj pladoj. Eldonis Ĉina Esperanto-Eldonejo. Pekino 1986, formato 120 x 182 mm, 71 p. Trad. el la ĉina de Liú Cajŝeng.

Ĉu vi ŝatas abundigi vian manĝotablon per eksterlandaj pladoj? Bv. provi tion helpe de la supre prezentita titolo!
Jam la antaŭparolo donas al la leganto kelkajn interesajn informojn pri la ĉina kuirarto kiel parto de la riĉa kulturo de tiu ĉi lando. Kiu laŭ kutimo manĝas per tranĉilo, forko kaj kulero, eĉ ekscias uzmanieron ĉinan, balanci nutrajpecojn per manĝobastonetoj en la buŝon.
En la ĉefa parto prezentiĝas 86 receptojmalvarmaj pladoj, viandaj, akvoproduktaj, kortbirdaj, ovaĵaj kaj legomaj pladoj, supoj, kukoj kaj aliaj pladoj, ĉiuj bonorde legeblaj. Ĝojige, ke la plej multaj receptoj estas realigeblaj ankaŭ de neĉino. Ke la ĉinaj pladoj okulplaĉas, pruvas belaspektaj koloraj bildoj sur la kovrilpaĝoj.

Ingrid Mewes

Kuracaj manĝaĵoj. Eldonis Ĉina Esperanto-Eldonejo. Pekino 1986, formato 120 x 182 mm, 63 paĝoj. El la ĉina tradukis Tang Ŝiúĝu.

Estas rimarkeble, ke la medicinistaro, almenaŭ en la eŭropaj regionoj, ekde certa tempo pli intense rememoras pri naturdevenaj materialoj por sanigi resp. kuraci homojn.
Ŭeng Ŭejĝan k.a. kompilis 87 receptojn el kelkaj ĉinaj eldonoj kaj montras, kiamaniere oni povas prepari kun relative facile akireblaj ingrediencoj el la naturo sanigajn manĝaĵojn.
Ĉu temas pri trinkaĵoj, freŝaj sukoj, preparitaj sen kuirado aŭ per dekoktado, aŭ supoj, vinoj kaj alkoholaĵoj, ĵeleoj, kaĉoj ktp. — ĉiam oni estas informita pri la kuraca efiko.
Tri apendicoj donas bonan superrigardon pri sanigaj efikoj de unuopaj ingrediencoj kaj nutroelementoj. Fine, en la lasta, ni ankaŭ ekscias pri taŭgaj kaj malpermesataj nutraĵoj por pacientoj.
La bildoj sur la kovrilo kaj unuaj paĝoj vekas nian apetiton.

Ingrid Mewes

Branko Ĉopiĉ: La legindaj partizanoj. Rakontaro. Trad. Branko Miljko Esperanto-Ligo Bosnio kaj Hercegovino (elbih) Sarajevo 1987, 76 p.

En tiu ĉi „nekutima elmilita rakontaro" ni trovas dek tri rakontojn, en kiuj ekrolas ankaŭ bestoj, montaroj, laboriloj kaj eĉ armiloj. Tiel Ĉopiĉ komunikiĝas kun la mondo de sia frua prozo, kiel en la fabelaro „En la mondo de Papilioj kaj Ursoj" bestoj estas la protagonistoj.
La aŭtoro inkluzivas en la tutpopolan luktadon kontraŭ la entrudiĝintaj faŝistoj kaj ties kunhelpantoj Ustaŝoj kaj Ĉentnikoj ĉion ekzistantan, perokule vidatan, la tutan landon. Tiu parolmaniero parencas kun la popola, ĝi estas inspirita de la liriko, per kiu Bosnio kaj ĝiaj homoj malfermiĝas al la mondo, rakontas al ĝi pri la kredo al libereco kaj humanismo.
Laŭ mia gusto parte iom tro da heroeco.
Bone prizorgita traduko kaj teknike perfekta eldono certe havigos al la libro sian legantaron.

Ralf Janke

Ivan Ŝivarov: Mia trezorejo Bulgara Esperantista Asocio 1985, 75 p.

La aŭtoro, aktivulo de la bulgara Esperanto-Movado jam de 65 jaroj ne nur kiel MEM-aktivulo batalanto por la paco, prezentas senpretendajn verketojn, kolektitaj de BEA sub la titolo „Mia trezorejo".
Temas plej multe pri personaj travivaĵoj sub la slogano „Per Esperanto por la mondpaco". Interkompreniĝo, interkonatiĝo helpe de Esperanto sur la bazo de interpopola amikeco kaj priskriboj de bulgaraj pejzaĝoj kiel la Roza Valo, sed ankaŭ ekskursoj en la historion ĝis la tempo de la batalo kontraŭ la turka jugo, faras la libreton multflanke interesa. La kvin versaĵojn mi probable ne nomus klasikaj — ĝuste senpretendaj.
Malgraŭ kelkaj preseraroj kaj pliboniginda preskvalito la libreto prezentas kontribuon por la ĉiutaga lukto por paco.

Ralf Janke

Mondkongreso de Monda Asocio pri Psikiatrio de infanaĝo kaj pri Koncernaj sciencoj.

En la itallingva svisa urbo Lugano okazos, 20-24.09.1989, la kvara mondkongreso pri psikiatrio de la unua infanaĝo kaj pri Koncernaj sciencoj. La mondkongreson organizas loka grupo de Monda Asocio pri Psikiatrio de Unua Infanaĝo kaj pri Koncernaj Sciencoj. Tiu asocio fondiĝis en 1980. Ties nuna prezidanto estas la usonano Robert N. Emde, kaj ties honora prezidanto estas Erik Erikson. Apartenas al ties estraro Serge Lebovici (Francio), Bertrand Cramer (Svislando), kaj aliaj konataj specialistoj.
La Mondkongreso estos dediĉata al „Novaj Orientiĝoj pri la Unua Infanaĝo." Aparte, oni antaŭvidas ĵenajn temarojn: „Novaj orientiĝoj en psikobiologio", „Novaj orientiĝoj en kliniko", „Kulturaj variaĵoj kaj infana disvolviĝo", „Novaj orientiĝoj en prevento kaj en terapio", „Novaj orientiĝoj en la studo de netipaj evoluoj".
Estus interese, se partoprenus ankaŭ Esperanto-parolantaj kongresanoj, kiuj povus alporti la pruvon pri la ekzisto de „speciala" kaj rekta „interparola" tekniko (fakte, la oficialaj lingvoj estos la angla, la franca kaj la itala).
Se almenaŭ kelkaj esperantoparolantaj specialistoj partoprenos, eblos organizi ion specialan por ili, kio servu ankaŭ kiel ekzemplo de demokratia kaj efika interdisciplina scienca interŝanĝo.
Interesatoj petu la informilon en angla-franca-itala al: D-ro Tazio Carlevaro, Via A. Di Sacco 6, CH-6500 Bellinzona (Svislando).

Laste aperis ...

— Angla antologio. Dua parto, 1800 — 1960. Div. tradukintoj, red. Albert Goodheir, kun enkonduko de Marjorie Boulton. Londono: Esperanto-Asocio de Britio, 1987. 432 p. 22 cm. Poemoj kaj prozo de pli ol kvindek el la plej konataj anglaj literaturistoj.

— Antologio de la hebrea poezio. Trad. kaj komp. J. Kohen-Cedek. Tel-Aviv: Esperanto-Ligo en Israelo, 1987. 268 p. 24 cm. Poemoj kaj kantoj de la bibliaj tempoj ĝis hodiaŭ.

— Aŭstralia antologio. Div. tradukintoj, red. Alan Towsey. Pizo: Edistudio, 1988. 431 p. 21 cm. Bind. Serio Oriento-Okcidento de UEA, n-ro 24. ISBN 88-7036-036-3. Zorge kunmetita trarigardo de la poemoj, kantoj, noveloj, romanoj kaj eseoj de Aŭstralio, kun biografiaj detaloj kaj glosoj, en tre bela eldona vesto.

— Bitch of Buchenwald, The, Julius Balbin, el Esperanto trad. Charls Rizzuto, kun enkonduko de William Auld. New York: Cross-Cultural Communications, 1986. 48 p. 21 cm. Holocaust Series, Chapbook 1. ISBN 0-89304-301-X. Poemoj bazitaj sur memoroj de travivinto pri la naziaj koncentrejoj.

— Brulo kaj ritmo. Antonio Agostinho Neto, el la portugala trad. Lutumba Tima. Enkonduko de Biserka Cvjetičanin. Zagreb/Lelystad: Internacia Kultura Servo kunlabore kun Vulpo-Libroj, 1987. 116 p. 21 cm. ISBN 90-70074-34-6. Poemoj de la fondinto de sendependa Angolo, kiuj grave kontribuis al „malkovro de la afrika identeco" dum la liberiga milito.

— Ĉinaj tradiciaj festoj. Ĉji Šing. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 124 p. 18 cm. Ilus. Serio „Feniksa Libraro". Detala priskribo de la deveno kaj evoluo, kutimoj kaj moroj de la ĉefaj etnaj festoj en Ĉinio.

— Danĝera lingvo, La. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Ulrich Lins (1943 —). Gerlingen: Bleicher-Eldonejo, 1988. 546 p. 19 cm. Ilus. ISBN 3-88350-505-6. Detale dokumentita historio de la atakoj kontraŭ kaj subpremo de la Esperanto-movado, precipe sub la reĝimoj de Hitler kaj Stalin sed ankaŭ en cara Ruslando, en la Ligo de Nacioj kaj en orienta Azio. Esenca legaĵo por iu ajn studanto de la movado.

— Dresado de la megero, La. William Shakespeare, el la angla trad. Gerald C. Jervis (1915 — 1985). Editoris Reto Rossetti Antaŭparolo de Brian Stone. Roterdamo: Esperantaj Kajeroj n-ro 10, 1988. 136 p. 21 cm. ISBN 0-9505323-8-X. Mirige freŝa kaj fidela redono de 16a-jarcenta komedio pri geedziĝo, de „la plej klera ŝekspirologo de Esperantujo".

— Dudek historioj. Div. aŭtoroj, trad. M. Lineckij. Ukraina Respublika Filio de ASE, 1987. 54 p. 21 cm. Plejparte humuraj rakontoj de famaj sovetiaj verkistoj.

— Dum vi estis kun ni. István Nemere (1940 —). Budapest: Oy Mendoservo Ak kaj Hungara Esperanto-Asocio, 1988. 165 p. 20 cm. ISBN 963-571-244-8. Streĉa detektiva romano ĉirkaŭ la temo de eŭtanazio (laŭpeta mortigo): kio estas krimo, kio ne?

— Elektitaj artikoloj pri gramatiko kaj retoriko Esperantaj. Div. aŭtoroj. Chongqing: LDE, 1986. 133 p. 19 cm. Ĉinlingvaj artikoloj, pluraj tradukitaj.

— Esperanta ŝtancila terminaro. Inĝ. Samuilo Mizeruĥa. Tel-Aviv: Esperanto-Ligo Israela, 1973, 14 p. 32 cm. Ilus. Zorge ellaborita fakvortareto pri la tekniko de prem-aliformigo.

— Esperantaj sinonimoj. J. Ojalo. Vilnius/Tallinn/Kaunas: B.Berin, 1985. 80 p. 21 cm. Mimeo Indekso. „Projekto" de sinonima vortaro surbaze de PIV.

— Esperanto-lietuviu ir lietuviu-esperanto kalbu žodynas. K. Puodénas. Vilnius: Mokslas, 1988. 288 p. 22 cm. Bind. ISBN 5-420-00387-2. Dudirekta Esperanta-litova vortaro.

— Esperanto: lingvo, literaturo, movado. Pierre Janton. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988. 120 p. 21 cm. ISBN 92-9017-034-4. Scienca kaj tamen populare verkita superrigardo.

— Esperanto: nekonata, miskonata. Claude Piron. Paris: Cours et Etudes de Linguistique Contrastive et Appliquée de Vincennes, 1988. 48 p. 21 cm. Mimeo. Laŭ la sukcesa franclingva informverko Espéranto: l'image et la réalité, cele al aliaj nacilingvaj versioj: detala, rezona demento de la plej oftaj malfavoraj antaŭjuĝoj.

— Gefährliche Sprache, Die. Die Verfolgung der Esperantisten unter Hitler und Stalin. Ulrich Lins (1943 —). Gerlingen: Bleicher Verlag, 1988. 326 p. 19 cm. Ilus. ISBN 3-88350-023-2. Koncizigita germana versio de La danĝera lingvo.

— Granda Meaulnes, La. Alain Fournier (1886 — 1914), el la franca trad. Roger Bernard. Antaŭparolo de Gaston Waringhien. Rotterdam/La Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eldono-preso respektive). 222 p. 21 cm. Belliteratura serio n-ro 32. Romano pri „la verda paradizo de amoj knabnaivaj"; la ĉefverko de sia aŭtoro.

— Infoduktoj. Nova vorto nova futuro. Luc De Brabandere, el la nederlanda traduko trad. BSO-kolektivo. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988. 142 p. 21 cm. Tabeloj k. s. ISBN 92 9017 038 7. Ali-emfaza rigardo al la komputila revolucio: kiel eblas akordigi ĝin kun la „verda" aŭ alternativa teknologio?

— Itala antologio. Div. tradukintoj, red. Giordano Azzi. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1987. 477 p. 21 cm. Ilus. ISBN 88-85872-02-6. Panoramo de la itala literaturo de la 13-a ĝis la 19-a jarcentoj, zorge komentariita kaj piednotita.

Pollando

28j. inĝenierino, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Alina Chruścińska, Aleja Lenina 40/37, **22-400 Zamość**

Edyta Lirtnowska, ul. 10 Lutego 13/1, **86-100 Świecie n/W.,** 15 j., dez. kor. tutmonde

Hanna Biernacka, Zakrzewo 24, **63-910 Miejska Górka woj. Leczno,** 15j., dez. kor. tutmonde pri sporto, filmoj, dancado

30j. oficistino dez. kor. pri literaturo, muziko, E-movado, turismo: Elzbieta Kembłowska, ul. Aleksandrowska 16 m 56, **91-120 Lódź**

30j. laboristo dez. kor. tutmonde: Grzegorz Wieńć, **62-005 Owińska,** ul. Poprzecna 14c/13

28j. ĉarpentisto dez. kor. kun geesp. el GDR p. ĉ. t., kol. bk, librojn: Kazimierz Bednarz, **43-100 Tychy,** ul. H. Sawickiej 17/30

Gekomencantoj, 15 — 35j., dez. kor. tutmonde: Klub Rolnika, Zabokliki 62A, **08-110 Siedlce**

Soveta Unio

Komencantino, 23j., dez. kor. pri literaturo, muziko, turismo; kol. bk, pm: Maie Männiste, **202 100 Rakvere,** NISU 13-1, Estonio

Irina Ŝĉanovskaja, **204 023 Brest,** Moskovskaja 340-248, 24j. inĝenierino, dez. kor. tutmonde pri Esperanto, sporto, kol. bk, pm

Svetlana Kuĉic, **224 000 Brest,** Vorovskogo 11-1, 26j. flegistino, dez. kor. pri medicino, vojaĝo, naturo, gastigado

Vladislav Vujek, **224005 Brest,** K. Marx 53-20, 46j. ŝoforo, dez. kor. pri vojaĝoj, kol. bk, pm, insignojn

14j. lernantino dez. kor. tutmonde pri vivo en aliaj landoj; kol. bk: Natalia Kazanceva, str. 40 let pobedi 7-32, **665 770 Usti-Ilimsko**

Studento de medicino, 22j., dez. kor. tutmonde kun samaĝuloj pri muziko, medicino, foto, tradicioj, junulara vivo; kol. librojn, bk, esperantajojn: Dainius Pranauskas, str. Putnos 9-78, **232 042 Vilnius**

Rasa Maĉiulaitite, Kosmonautu 16-62, **235 000 Jonava,** Litovio, dez. kor. pri hindia filozofio kaj jogo

26j. komencantino dez. kor. tutmonde. p. ĉ. t.; kol. bk; Rasa Kviklyte, Saltkalviu 54-24, **232 038 Vilnius,** Litovio

Bonifacijus Kaspezinnes, **234 690,** a. d. 12, Drushininkai, Litovio, 50j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

14j. lernantino dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.; kol. pm, bk: Jolanta Mitkeviĉiute, **235 240 Joniškelis,** Mažupos 8, Litovio

14j. muziklernantino dez. kor. pri muziko, sporto, turismo, literaturo; kol. pm, bk, kaltendaretojn: Regina Savickaité, **235 240 Joniškelis,** Statybiniu Medžiagu gamykla, Litovio

47j. inĝeniero dez. kor. pri arto, filatelio, Esperanto; kol. bk: Aleksandr Vajsberg, Murmansk. obl., **184 280 Monĉegorsk,** abonkesto 53

Membroj de E-klubo „Antaŭen", **Kirov — 610 017,** p. k. 386, dez. kor. pri E-agado en div. urboj k ĉiutaga vivo k historio.

Komencantino, 16j. lernantino, dez. kor.: Daiva Mikalajunaite, **235 250 Pasvalys,** Sajungos 4-10, Litovio

25j. komencanto dez. kor. tutmonde pri aviado, turismo; kol. bk, urboplanojn: Igor Komarov **232 038 Vilnius,** g. Rodunes Keles 8

Onute Pikúnaite, **234 580 Alytus,** Sudvaju 9-30, Litovio, 19j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

36j. ekonomistino dez. kor.: Viljia Viziene, **232 056 Vilnius,** Virŝuliškiu 67-53, Litovio

Infanoj de nova Esperanto-rondeto (10-14j.) dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. kun samaĝuloj: Esperanto-rondeto, Dvorec pionerov, ul. Konstitucii 1, **660 049 Krasnojarsk**

32j. oficistino dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, pm: Stasé Paulikaite, **235 720 Palanga 2,** Sventoji, Kurŝiu takas 1, Litovio

Elena Subakova, **309 670 Belgorodskaja reg.,** Volokonovskij dist., vil. Jutanovka, str. Nadreĉnaja, 45, 21j., dez. kor. tutmonde pri literaturo, mod. muziko, kol. bk, pm

17-35j. geesp. dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. Adreso: E-klubo „Cedro", **Novokuzneck,** p. k. 2532

14j. komencanto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Vladimir Lelmej, ul. Sodrujestva 41/1, kv. 108, **344 103 Rostov-Don**

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, Aue, 9400
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16